

# esperantoUSA

1992(2)

The ELNA Newsletter: News of the Language Problem and Esperanto as the solution

## Making News This Issue

### Sex and Esperanto

Esperanto, like other modern languages, has been accused of intrinsic sexism. How sexist is Esperanto, anyway? What can we do about it? And how can Esperanto help solve the more general problem of sexism in society?

See Page 2

### Voice of America

During the period 1959-1961, Voice of America broadcast a number of programs in Esperanto. Dr. William Solzbacher tells us how this came about, and what were the results.

See Page 7

### Ronald J. Glossop

Prof. Ron Glossop, Southern Illinois University (Edwardsville), talks about how he learned Esperanto and why the language should be taught to gifted and talented children.

See Page 9

### In This Issue:

An Alternative View of Esperanto Activity 4

Food for Thought (?) 6

On Learning Esperanto 14

And Much, Much More to  
Delight and Inform You!

## Nova Didaktika Sistemo?

### Kiel plibonigi vian Esperanton

de Rob Hardy

Unu jaron post kiam mi finis la poŝtan kurson de ELNA, mi povis legi kaj skribi Esperanton; mi legis kaj skribis malrapide, sed mi povis kompreni kaj kompreniĝi. Mi volis gajni pli grandan vortprovizon, kaj pli bone kompreni la gramatikon. Miaj korespondantoj kontrolis miajn leterojn, sed eĉ kiam mi skribis tuj post ĉiu letero de ili, mi ne uzis multe da tempo skribi Esperante. Mi legis librojn, kaj ĝuis ilin, sed mi trovis, ke se mi komprenis frazon, mi ne penis lerni kiel la frazo funkciis, kiaj vortoj kunuziĝis, ktp. En la kunvenoj de mia klubo en Kembriĝo (Cambridge, Anglujo), mi povis uzi la vortojn kaj frazojn kiujn mi jam konis kaj kutime uzis, sed mi opiniis, ke mi povas plibonigi mian lernadon.

La instigo al la metodo kiun mi elektis estis la akiro de komputilo kun vortprocezo. Per tio, mi povis facile skribi kaj reskribi, kontroli, ŝanĝi la vortojn, ktp. Oni ne devas havi tian ilon por uzi mian metodon, sed ĝi ja pli faciligas la laboron.

Mi volis peni grandan laboron de tradukado. Mi opiniis, ke se mi povus sukcese traduki tutan libron, mi gajnus bonan fluecon en la lingvo. Mi sciis, ke tia laboro postulos multe da tempo, sed mi ankaŭ sciis, ke mi povos labori malrapide se mi deziras, ekzemple traduki nur unu paragrafon ĉiuvespere, kaj se mi nur daŭrigus la laboron, mi finus ĝin.

Kiun libron elekti? La plej bona estus libro kiun mi tre bone sciis, kiun mi multfoje jam legis, kaj kiun mi sufiĉe amis por kuraĝigi la daŭrigon de mia laboro. La angla lingvo de la libro devus esti tre klara. Kaj fine, neniu devus antaŭe

traduki la libron; mi faros la taskon por plibonigi mian lingvan kapablon, ne por fine eldoni la tradukon; sed eble eldonaĵo okazos.

Mi elektis *Pride and Prejudice*, la plej faman verkon de la angla verkistino Jane Austen. Mi neniam vidis ties tradukon, sed mi skribis al s-ro William Auld por certiĝi. Li informis min, de f-ino Austen neniam eniris Esperantujojn. Antaŭ tri jaroj, mi komencis la taskon.

Mi ne povas diri, ke mi gajnis per la tasko tutan fluecon. Mi tamen certigas vin, ke mia vortprovizo ja pligrandiĝis, kaj mia scio pri la gramatiko ja pliboniĝis; tio okazis ĉar mi devis uzi Esperanton kiel mi neniam antaŭe uzis ĝin. Mi devis zorge ekzameni anglajn frazojn kiujn mi mem ne uzus. Mi de tempo al tempo miris, ke iu ajn povas kompreni la anglan lingvon. (Ekzemple: "It is that I condescended to adopt the measures of art so far as to conceal from him your sister's being in town." Kaj tiu frazo ne enhavas idiotismojn!) Mi maltrankviliĝis pri kiel montri la stilon de la letero de s-ro Darcy, kio estas tute malsama ol la stilo de la verkistino mem. Sed mi devas konfesi, ke la plej granda ĝojo de la laboro ne estas la pliboniĝo de mia Esperanto, sed la plezuro zorge kaj atente legi ĉiun vorton, ĉiun frazon de f-ino Austen. Ĝi estas plej bela libro; se vi neniam legis ĝin, ne atendu la tradukon, sed legu ĝin per la angla nun!

Post kiam mi finis ĉapitron, mi faris kopiojn por miaj klubanoj. Ili ĉiam montris ĝojon kiam ajn mi donis alian ĉapitron, kio kuraĝigis min. Ili kontrolis la tradukon; mi speciale dankas s-ro Sidney Fox kaj s-ro Lionel Elvin pro la helpo kiun ili donis. Kontroli ne estas tiel

Daŭrigo sur paĝo 13

# GUEST EDITORIAL

## SEKSO KAJ (MAL)EGALECO

*de Jonathan Pool kaj Derek Roff*

[Ankoraŭ du leteroj alvenis lastatempe ĉe mi, reage al la letero de Diane Gorgen kaj Craig Wallace en 1991(6); kaj ili estis tiel longaj, ke mi decidis trakti ilin kiel apartan artikolon. Mi intencas per ĉi tiu artikolo fini (provizore) la diskuton pri sekso kaj Esperanto sur la paĝoj de EUSA. En la nuna momento, mankas al ELNA Komisiito por Virinaj Aferoj; se legantoj opinias, ke tia posteno estas bezonata, ili bonvolu informi la Prezidanton pri tio (ĉe la adreso de la C.O.). Ekzistas ĉe UEA tia Komisiito: E. Bormann, Schärstr. 26, D-W-1050 HAMBURG 80, Germanio.]

Responde al la letero de Diane Gorgen kaj Craig Wallace en numero 1991(6), mi proponas iom alian interpreton.

Ili plendas ke Esperanto seksismas ĉar ĝi ujas inan sufikson sed ne aban sufikson. Vi respondas ke oni rajtas tamen uzi aban sufikson; vi mencias “-iĉ-” kiel ekzemplon. Vi pravas, sed ĉu via solvo solvas ilian problemon? Laŭ mi, ne tute.

La problemo ne estas ke Esperanto devigas siajn uzantojn seksisme esprimi. La tradiciaj reguloj ja seksismas, sed ilin oni povas facile senseksimigi. Por tion fari, sufiĉas ekzemple:

(1) aba sufikso (mi uzas “-ab-”);

(2) apartaj senseksa kaj aba tria-personaj homaj pronomoj (mi uzas “li” kiel senseksan kaj “hi” kiel aban);

(3) decido uzi ĉiujn tradicie seks-indikajn vortojn (ekzemple “frato”, “policisto”) sensekse;

(4) decido esprimi ĉion pri la du seksoj simetrie (ekzemple, ne nomi abon “instruisto” kaj inon “instruistino”, nek diri “S-ro” kaj “S-ino”, sed aŭ nomi inojn kaj abojn “instruisto”, “S-ro”, ktp, aŭ uzi la aban sufikson por aboj ĉiam kiam oni uzas la inan sufikson por inoj).

Krome, Esperanto ne tiom suferas pro pli subtilaj seksismaĵoj, kiom iuj lingvoj.

La plej subtila seksismo aperas ĉe malsimetriaĵoj reguloj de bona stilo. Ekzemple, laŭ Robin Lakoff en *Language and Woman's Place* oni rajtas anglalingve diri “Mary is John's widow” sed ne “John is Mary's widower”—malpermeso kiu seksisme indikas ke inoj apartenas al aboj, sed malpermeso kiun la plej multaj lingvuzantoj obeas eĉ sen scii ke ĝi ekzistas. Tamen, ĉe Esperanto oni toleras multe pli diversajn esprimkielojn ol ĉe firme tradicioziĝintaj lingvoj.

Do, facilas senseksimigi Esperanton, sed ĉu per tiu fakto samideanoj Gorgen kaj Wallace povas kontenti? Ne, ĉar ili ne volas uzi Esperanton inter si du, kiel kartludon. Ili volas uzi ĝin kiel organizilon en granda homa socio por konstrui novan mondon. Estas facile sendanĝerigi pafilon: ne pafu. Sed, se la homoj misuzas pafilojn, pacamantoj ne kontentas. Same, estas facile senseksimigi Esperanton. Sed, se la esperantistoj plu uzas sian lingvon seksisme, kontraŭseksismanoj ne kontentas. La problemo ne estas Esperanto. La problemo estas la esperantistoj. La esperantistoj, kiel trovis Forster kaj Jordan en siaj esploroj, ne estas kredantoj pri la seksa egaleco, nek pri la klasa, rasa, religia aŭ iu ajn alia egaleco. Ili eĉ ne estas kredantoj pri la lingva egaleco. Ili estas politike tre diversaj—ĝuste laŭ la espero de Zamenhof.

La solvo al la problemoj de Gorgen kaj Wallace estas rekompreni la rolon de Esperanto. Esperanto ne estas ideologia lingvo, kies uzantoj formas partion. Esperanto estas komunikilo preskaŭ neŭtrala, kies uzantoj malsamopinias pri preskaŭ ĉio inter si. Do, Esperanto donas al ni mondeton, interne de kiu ni povas sen lingvaj baroj konkurencigi niajn ideojn kontraŭ multaj aliaj ideoj. Kaj, batalante por la seksa egaleco, oni batalas ne nur per Esperanto sed ankaŭ pri Esperanto. Oni argumentas interalie por

senseksimigita Esperanton kaj montras per sia propra parolado kaj skribado ke ja facilas kaj elegantas uzi nian lingvon senseksisme. Hodiaŭ probable malpli ol 1% de la esperantistaro uzas la lingvon senseksisme. La celo de egalismo estas inversi tiun statistikon. Kiam oni atingos eble 20%, novaj lernolibroj jam devos agnoski la egalismajn normojn kiel “dialekton” de Esperanto. Kiam oni atingos 40%, la ankoraŭaj seksismantoj jam aspektos kiel malaperantaj pradipektuzantoj. Preskaŭ ĉiuj perceptos la ŝanĝdirekton kaj laŭos ĝin por ne ekŝiĝi el la ĉefa komunumo. Esperanto estis pionira lingvo kiam ĝin lanĉis Zamenhof. Kiam ĝi per la tempo arĥaikiĝadis, ĝin repioniris literaturaj, instrumentodaj kaj tradukteĥnologiaj inventistoj. Hodiaŭ la seksisma arĥaikeco de la tradicia lingvouzo ĉe Esperanto evidentas. Gorgen, Wallace kaj aliaj egalismoj do ankaŭ nun havas la privilegion kunstrebi por repioniri Esperanton; per ilia sukceso Esperanto restos inda kaj iva por lingve liberigi la mondon.

Jonathan Pool

The letter from Diane Gorgen and Craig Wallace on Esperanto's sexism really upset me. It upset me because I strongly agree that there is a problem, but I strongly disagree with the context they put it in and their way of dealing with it.

When I started studying Esperanto, I kept a mental list of all the things wrong with the language. This seems to be common for new Esperantists. We have high expectations and clear ideas (we think) of what an International Language should be. That list grew for about the first two years that I studied. What I found very interesting is that eventually my list began to shrink. The more I studied Esperanto, the more I found that what had initially seemed like a bad idea, actually

served a very important role in more advanced communication. As I studied other languages (twelve, so far), I realized that many of the "flaws" of Esperanto parallel those in other languages, and are often much milder. I understand more completely that an international language can not be all things, and I respect the compromises that were chosen. My list of "flaws" is now quite short, but it still includes the lack of a male suffix.

If we agree that Esperanto in its current form is not perfect, what do we do? Some people are so offended by imperfection that they abandon the whole project of egalitarian, international communication. I think this is sad. We must judge the value of Esperanto in context with other languages and alternatives. Esperanto is inherently less sexist than any other language used in international communication, as well as having significant advantages in political and cultural neutrality, and relative ease of acquisition. *Gesamideanoj* (what other language offers the non-sexist *ge-* as a standard feature?) Gorgen and Wallace say that Esperanto lags behind English in removing sexism from the language. I think this is false. They mention examples like the use of Ms. and Chairperson to show this. This conclusion embodies three misconceptions:

1. Though important, this is not really a change in the *language*, but simply the adoption of a few new terms. A change in the language means a change in something more fundamental about structure or usage. Even a simple change in pronoun use ("If an English speaker desires a non-sexist language, *he* (*s/he*, *he/she*, *they*?) should give up.") has not been adopted widely.

2. Esperanto has fewer inherently sexist elements than English, while both are ahead of French or Spanish. Even so, Esperanto is undergoing a shift toward non-sexist usage that is more complete and further along than the aforementioned languages. For a majority of Esperanto speakers, the *-o* ending does *not* generally imply male. More on this below.

3. Sexism in a language is far less important than sexism in the speaking

community. It is great that a certain portion of English speakers have changed their speech habits, adopting less sexist terms. But we still have a big problem with sexism in our society, on both symbolic and concrete levels. While America is probably ahead of most of the rest of the world, it is easy to find English speakers who are very sexist in both speech and action. Even an idealized image of American society is far behind the Esperanto community in this regard. Esperantists also must improve, but it is false to say we lag behind any English-speaking culture. Since English is used in both sexist (often) and non-sexist (sometimes) ways, it is hard to decide conclusively about how sexist the *language* is.

Our knowledge of sexism in our culture influences our analysis. We see Esperanto as having a "monumental slight toward women" because it lacks a male suffix. Imagine if the reverse were true, that Esperanto had *only* a male suffix. Would we feel that the language slights men? No, I am sure Ms. Gorgen, Mr. Wallace, and I would all be screaming that this is a terrible *anti-woman* feature of the language. Odd, isn't it, that even reversing the roles, the situation still seems anti-woman. This is because we know that society is anti-woman, and tends to turn any difference against the oppressed. The obvious solution is equality, at both the cultural and linguistic levels.

As mentioned in points two and three above, Esperanto has come a long way in attaining cultural and linguistic equality. It is now the norm among young Esperantists, and many others, to treat the *-o* ending as neutral, indicating nothing about gender. When one *wishes* to specify gender, *-in* is available for women. Nothing so simple is available for men. Esperanto speakers make do with various alternatives, depending on the situation. Again, a male suffix is an obvious solution, but the current usage by this group of Esperanto speakers does not fit the sexist description presented by Gorgen and Wallace. And again, we see that the important issue is not a change in the language so much as a change in the way its speakers choose to think about the world.

The most distressing sentence in the Gorgen/Wallace letter for me was the phrase, "We have found great personal difficulty recommending Esperanto..." because of this flaw. This desire for perfection is something I constantly battle in myself, in order to get anything done. The peace movement, the civil rights movement, the ecology movement, the Esperanto movement are all far short of my desires. It is tempting to abandon all of them, because they are all so badly flawed. Yet that leaves us with a status quo which is far worse, suffering in the extreme from exactly the flaws that bother me about these movements. In terms of international communication, abandoning Esperanto leaves us with English, French, Spanish, etc., which are inherently far more sexist than Esperanto has ever been, as well as embodying a host of historical baggage and tradition which encourages sexist thought.

I agree that having a grammatical male suffix would be great. I personally favor (and use) *-un*, but I would be happy to accept the proposal I first heard from Sid Culbert, *-ur*, or even the more popular but linguistically inferior *-iĉ*. It will be a good day when the Academy approves this or a similar choice, encouraging all speakers to consider the male suffix part of standard Esperanto. That day will come. Until then, I suggest to Ms. Gorgen and Mr. Wallace that they use the suffix of their choice at every opportunity, while actively participating in Esperanto's battle for a better world. That they recommend Esperanto to all their friends. That they point out how much the language needs a male suffix, and that they invite everyone, particularly their new recruits, to join a crusade to make male-suffix usage the norm. That is how the language will be changed, and not by any decisions by ELNA or UEA. Kaj mi instigas ĉiujn (ge)esperantistojn, junulinojn, junulunojn (kaj male), intelegantulinojn, inteligentulunojn (kaj simile), plibonigemulinojn, plibonigemulunojn (kaj inverse), ktp, ktp, limigi la batalojn inter ni, kaj uzu la ŝparitan tempon kaj energion por plibonigi la mondon, ne nur lingve, sed ĉiurilate.

Derek Roff

# DE LA EKSTERO ... DE LA ENO

de William O'Ryan

En sia artikolo "De la supra ... De la subo" (*Esperanto USA* 1991(1) p. 2) Don Harlow bonege traktas la valoron de "desubismo" kaj la kontrastan senvalorecon de "desuprismo" kiel movadaj strategioj. Ne estas kritiko atentigi, ke temas pri multidimensia afero el kiu li ĝuste izoligas unu dimension. Restas izoliĝe trakti aliajn dimensiojn kaj poste replekti ilin kun la dimensio supro-subo. Tiale, ĉi tie mi priskribos alian dimension, sugestos kiel varias valoro laŭ ĝi, kaj ekfaras komparon.

1

Alia dimensio laŭ kiu luktas strategie gravaj kontraŭaj emoj nomeblas "deeksterismo-deenismo".

"Deeksterismo" estas emo dediĉi energion prioritare por allogi novulojn el ekster la movado. Tiuj pli kaj pli amase partoprenos la movadon kaj mem allogos pluajn aliajn. Imageble, "deeksteristo" sin revas neĝbulo lavangiĝonta. La energio alĝuiĝi kaj kreski alvenas deekstere.

"Deenisma", male, estas emo, foroferante la amason de novuloj, dediĉi energion prioritare sur tiujn jam en la movado—precipe sur sin. Oni rigore venkas propran emon krokodili kaj strebas fari pli utila la scipovon kaj uzon de Esperanto; ju pli Esperanto funkcios kaj utilos inter jamuloj, des pli bone engreftiĝados novuloj, dum malrapide venadas per si interesatoj. "Deenistoj" opinias, ke firma fundamento konstrueblas, nur se entute oni ĝin konstruas. Imageble, deenisto sentas sin beba astro kiu kreskas per la alfalado de asteroidoj. La energio kreski efikas deene.

(Por precize izologi kaj teni klara por ĉiuj tiun dimension, mi evitas terminojn kiel "raŭmismo".)

Konkretigas dimension kaj fiksas ĝian direkton kaj esencon ĝiaj ekstremoj (ĉi-kaze esperinde vakaj): "Pura deeksteristo" diligente reklamas kaj skribas leterojn al gazetoj, informas kaj lekcias, varbas kaj foje instruas, peticias kaj ... krokodilus; li aŭ ŝi lamus rilate la bazajn lertojn, kompreno, parolo, lego kaj skribo. "Pura deenisto" diligente studas kaj legadas, kunvenas kaj oficas en klubo aŭ asocio, poluras sian lingvokonon kaj verkas, gastigas kaj vojaĝas Esperante; li aŭ ŝi lamus rilate "publikan informadon".

Ambaŭ ekstremoj do evitindas: Reklamado sen fundamento impresas vaka promeso donanta al novulo nenion ĉe kiu resti, nenion en kiu enradikiĝi; ĝi nenion atingos. Sed fundamento sen reklamado restas nekonata kaj kovas kultismon; ĝi sendube sukcesus, sed eble nur post la fino de la universo. Minacas puran neĝulon suno kaj vento; minacas puran astrulon iĝi malaperanta "nigra truo".

Feliĉe, ke realaj homoj troviĝas inter la du ekstremoj. Ni eĉ mikse istas ambaŭisme, iuj pli deeksterisme, aliaj pli deenisme.

2

Iu aliro al kompara taksado de la polusoj strategiaj, deeksterismo kaj deenismo, rigardas tiun dimension simple kiel dialektikan lukton. Tiavide, oni (individuo, loka grupo aŭ asocio) lokiĝas en tiu dimensio laŭ la komparo inter la du sumoj de siaj energi-elspezoj deeksterismaj kaj deenismaj. Temas pri la utilo por nia afero de tiuj relativaj lokoj en la dimensio. Ni memoru, ke deeksterismo sin dediĉas unuavice fari propagandon (deklarado, reklamado, tamtamado kaj deklamado)—sume famon. Kaj ke deenismo sin dediĉas unuavice jamigi fundamenton (faroj, lertoj, praktiko kaj uzo)—sume jamon.

Ankaŭ ĉi-dimensie konvenas la esence samaj du kriteriaj demandoj per kiuj Don Harlow provis la dialektikon desuprismo-desubismo; reformulitaj ili estas: (1) Demando pri akcepto: Ĉu kresko varias laŭ famo aŭ laŭ jamo? Kaj (2) demando pri celo: Kiuj denove estas la klientaro al kiu destinis la lingvon Zamenhof kaj post li ni ĉiuj? Ĉu al tiuj ordinaruloj kiuj (pro kia ajn kialo) ne akceptas ĝin uzi, aŭ al tiuj ordinaruloj (kiel vi kaj mi) kiuj ja strebas vere utiligi ĝin kaj flegi pli kaj pli riĉan, multan kaj solidan veran komunikadon pere de ĝi?

(1) Pri kresko: En S. Peterburgo en 1910 Zamenhof diris:

Niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la naciaj, havas antaŭ ĉio signifon instruan kaj edukatan. ... Eĉ interne de la esperantistaj grupoj oni ofte ne kuraĝas paroli

Esperante, oni balbutas, oni preferas paroli en nia nacia lingvo, kaj proporcie al la nekuraĝeco de la parolado aperas ankaŭ nekuraĝeco de propagando, ĉar la esperantistoj-balbutantoj malgraŭvole ne povas liberigi sin de la timo, ke eble tamen Esperanto estas afero pli teoria, ol praktika.

Tiu citaĵo forte subtenas la deenisman tezon: unue oni bone lernu la lingvon kaj poste oni povas efike propagandi; manko de jamo, febliĝas la famo.

Ŝajnas, ke sinteno plejparte deenisma povas doni la pli altan rendimento, t.e. pli da vera kresko por unuo da energio. La kapablo de movado kreski egalas la akceptadon de la klientaro signife paropreni. Do, propagandi sen unue majstri la bazajn lertojn analogie similas konstrui palacon el betono en dezerto uzante tro da sablo kaj maltro da cemento, dum kultisme neglekti la propagandon similas pretigadi cementon kaj akvon en dezerto por plej efike ricevi kaj partoprenigi nur la alblovatan sablon. La sablo (kaj la homoj) nature ekzistas; oni bezonas alporti ĝin (informi ilin), sed pli grave kaj prioritare oni bezonas jam antaŭe fabriki fortike koherivan cementon (la Esperantan medion: movada fundamento, flua, plene funkcianta kaj multa parolantaro kaj literaturo).

Kompreneble, se deenisma strategio pli bone efikas por kultivi esperantistojn el interesatoj, tamen deeksterisma strategio restas utila por generi interesatojn el la nesciuloj.

(2) Pri celo: Klarigante ĝian internan ideon Zamenhof (Genevo 1906) skribis pri Esperanto, "ke ĝi alproksimigas ... korojn." Ĉu tia alproksimigo mondscale eblas per turist-nivela balbutado aŭ per inter si nekongruaj "gliŝaj" lingvoj? ("Gliŝa" lingvo = miksaĵo kiel "Franglish", "Spanglish" aŭ "Esperglisch"; el gliŝaj lingvoj fontas miskomprenoj kaj ili malklarigas al siaj parolantoj norman Esperanton.) Ŝajnas al mi, ke la potencialon atingi tiun celon, alproksimigi korojn, plafone limas la kiomo de interkompreniĝo kio okazas per Esperanto. Kaj ke tiun interkompreniĝon, siavice, plafone limas la kiomo de homoj kiuj lernis al si flue kaj plenuance per

ĝi paroli, aŭskulti, skribi kaj legi. Inter tiuj, kiuj majstras tiujn lertojn la emo aŭskulti kaj legi dependas de la intereso kaj riĉo de la aŭdeblaj diroj kaj de la literaturo. Tial, ankaŭ la celo de Esperanto pravigas strategion precipe deenisman..

La ekzisto de la danĝero, troismo (Waringhien skribis aliteme en la antaŭparolo de PIV, "Mi opinias efektive, ke unu el la danĝeroj, kiuj minacas nian movadon, estas la esotereco de sekto refermiĝanta sur sin mem, kaj sistemo rifuzanta la influojn de la ekstera mondo") ne malpravigas la deenisman tezon, ke preferindas akumuli la jamojn kaj pravigi la famojn ol tion ĉesi por tamburi tamtamojn.

Ĉagrena miskongruo troviĝas inter la bezonata lingvo-nivelo ĝenerala kaj la lingvo-nivelo ĝenerale akceptata. (La bezonatan lingvo-nivelon implicas la supraj konsideroj pri kresko kaj celo; la ĝenerale akceptatan lingvo-nivelon implicas la alta proporcio de aŭdebla krokodilado kaj "glišado" kompare al norma Esperanto, kaj la malalta proporcio de vendataj libroj (krom lernolibroj) kompare al ĉiaj taksoj pri la kiomo de Esperantistoj.)

Malfortoj de dialektika trakto estas subjektiveco, apriorereco kaj antaŭsupozo, ke ekzistas nur unu ideala lokigo en la dimensio.

Malpli simpla maniero trakti la dimensio, deeksterismo-deenismo, rigardas ĝin kiel gamon de diversaj okupoj el kiuj preskaŭ ĉiuj estas valoraj kaj egale nepraj. Iuj estas pli deeksterismaj, aliaj pli deenismaj. Sed ja ne estas altrendimente elspezi egalan energion por ĉiuj diversaj okupoj. Celindus laŭ la gama vido aposteriore malkovri aŭ konstati la plej altrendimentaj kvocientoj inter energi-elspezoj. Tiuj kvocientoj povas esti malsamaj por diversaj individuoj, por loka grupo kaj por asocio.

Kiel klarigan ekzemplon komparan ni rigardu la aŭtomobilan industrion. Inter "fakoj" de tiu industrio estas: teĥnika literaturo, inĝenieroj, vendejestroj, riparistoj, bonaj veturigantoj, vendistoj (veturigipovaj), (vendistoj neveturigipovaj), aĉetintoj, eblaj klientoj, ktp. La diversaj tiuj "fakoj" meritas diversajn energiojn; ekzistas kvocientoj inter ili: ekz. (per arbitre konjektitaj numeroj) estu po 100 vendejestroj je inĝeniero, po 5 riparistoj je vendejestro, po 100 klientoj je vendisto, ktp. Ne ekzistu vendistoj kiuj ne scipovas veturigi.


Tute analogie ni povas rigardi la "fakojn" en la movado: literaturo,

esperantologoj, altnivelaj instruistoj, flujaj parolantoj, instruistoj Esperante parolemaj, (instruistoj "glišemaj" aŭ ne esperante parolemaj), trastudintoj, interesatoj, varbebluloj, ktp. Denove altrendimento inter energi-elspezo kaj kresko postulus certajn kvocientojn: ekz. po certa grandeco de la literaturo je interesato (ne malpli), po certa nombro da novuloj je parolanto (ne pli), ktp. Ne ekzistu krokodilemaj kaj glišemaj instruistoj.

Mia persona impresio estas ke lokaj grupoj foje tro deeksterismas; ni foje tro varbas kun la rezulto, ke interesatoj en la kunvenoj devas paroli unu kun la alia pro manko de parolantoj ĉe kiuj novuliĝi. Ĉe la asocioj, male, mi sentas iom troan deenisman. Mankas bona malmultekosta kaj plena serio de unupaĝaj informfolioj pri diversaj temoj. La varbantoj de aliaj movadoj ofte havas multajn tiajn sur la varbotabloj; Esperantistoj eĉ ne konkurencas tiurilate.

3

La dimensioj kompareblas kaj dialektika kaj game: La grafikajo montras dialektan interrilatiĝon:



en kiu la kvar partoj klasas la okupojn:

- A) Desuprisma deeksterismo  
peticio oficialigi aŭ devigi Esperanton,  
1970aj kolopodoj Esperantigi ŝtatestrojn;
- B) Desuprisma deenismo:  
parolado en flua Esperanto ĉe UK far ŝtatestro
- C) Desubisma deeksterismo:  
reklamado,  
varbado de ordinaruloj,  
krokodilado,  
"glišado" de instruisto
- D) Desubisma deenismo

legado, kunvenado,  
flue kaj norme paroli,  
ĉia klopodo plibonigi sian Esperanton,  
instruistoj, kiuj parolas norman Esperanton  
C & D) Desubismo miksite  
varbado far flujaj parolantoj

Supre mi argumentis, ke (D) pli utilas ol (C). Don Harlow argumentis, ke (C) pli utilas ol (A). Li ne traktis la kategorion (B); ĝi (je unuo de energio) sendube pli utilas ol (A), sed (je unuo de energio) sendube ankaŭ pli utilas ol (D). En ordo de pleja utilo ĝis malpleja utilo, la serio estas: B D C A. Ankaŭ notindas, ke la konkludo pri la plia utilo de desubismo ol desuprismo validas nur por A kaj C, sed ne (aŭ almenaŭ ne tiom) por B kaj D. Tio sugestas, ke la dialektiko, deeksterismo-deenismo, pli gravas ol la dialektiko, desuprismo-desubismo.

La rilato inter deklaroj kaj faroj estas pli klara por desuprismo-desubismo ol por deeksterismo-deenismo. Tiuj, kiuj peticias, subtenas peticiadon kaj tiuj, kiuj tion ne subtenas ĝin ne faras. Sed, iuj pretendas deenisman kaj tamen krokodilas, aliaj subtenas deeksterisman, sed zorgas unue bone lerni la lingvon.

Gravaj kvocientoj troveblas ankaŭ laŭ la dimensio desuprismo-desubismo, ĉar oni faras plenan gamon da klopodoj laŭ tiu dimensio: klopodo ricevi la rajton uzi Esperanton en lando kie ĝi estas kontraŭleĝa, klopodo ricevi permeson uzi lernejan aŭ bibliotekan ĉambron vespere, klopodo ricevi rajton instrui Esperanton por kredito sed sen ŝtata subteno, ktp, ktp. Se la celo de klopodo havas meriton, ĝia ŝanco dependas de la grandeco de la movado en la koncerna lando kaj de la kiomo kaj kvalito de aliaj jamoj, kiel ekz. la disponebla literaturo.

Resume, aldone al la dialektika lukto inter subtenantoj de diversaj sintenoj desuprismaj kaj desubismaj, ekzistas simila lukto inter tiuj de diversaj deeksterismaj kaj deenismaj okupoj. La plej bona strategio montriĝas miksaĵo kiu forte emfazas la desubismajn kaj deenismajn sintenojn. La kvocientoj inter la energioj dediĉitaj divers-okupe estas esplorendaj aposteriore kaj laŭsituacie. Sed entute: Pli da ago, kaj malpli da blago!

Dankon al Don Harlow pro lia artikolo. Se ni Esperantistoj komencos nun pli koncentriĝi sur desubismaj klopodoj, pli ol duoblan dankon! Pri mia nuna artikolo mi estos feliĉa, se ĝi vekos pli dadiskuto pri ĝiaj kaj parencaj temoj.

# U.S. Junk Food & Some Good Stuff: II

by Doug Portmann

In the last article of this series, we dealt with a few pesky Esperanto root words for foods. Now it's time to look at the problem from the vantage point of English.

I'm not going to spend time on foods that present no difficulties in translation. Most fruits, vegetables, and meats do not present difficulties in translation, since equivalent terms usually exist in various languages including Esperanto. Thus, if you don't know the Esperanto equivalent to apple, pear, grape, bread, beer, thyme, nutmeg, lamb, or beef, you can look them up in any good Esperanto dictionary. Likewise, if you don't know the English equivalents to the Esperanto *persiko*, *juglando*, *vino*, *cervaĵo*, *kokaĵo*, *bulko* or *lakto*, an Esperanto dictionary will tell you.

Nor is this article or those following going to deal with gourmet or exotic food. (Sorry, no sushi, quiche, Wiener schnitzel, borscht, chicken à la Kief.) Rather, our concern is popular American kinds of foodstuffs, much of them known as junk food. Things like banana split, cheeseburger, croissant, donut, gingerbread, onion rings, pizza, sloppy joe or waffle. It is this delicious stuff we are exporting nowadays to foreign countries, thanks in part to McDonald's and other fast food chains.

To help me decide on Esperanto equivalents to the various English terms below, I requested the help of a number of competent Esperantists. I wish to thank R. Lewin, D. Harlow, R. Simmonds, and G. Coates for responding. Here is a list of American foods from A to C. The rest will follow in future articles.

APPETIZER— *aperativo*  
APPLE FRITTER— *poma (flan-)fritaĵo*, *poma benjeto*  
BAGEL— *kringo*, *bejgelo\**  
BANANA SPLIT— *banana revo*, *banan-krevaĵo*, *banano kun sirop-glaciaĵo*  
BISCUIT— *soda pan(et)o*  
BROWNIE(S)— *kekso-kuko*, *ĉokolada kuketo*, *ĉokoladaĵo*  
BUBBLE GUM— *blovogumo*; *bobela maĉgumo*  
BUN— (*ŝel*)*bulko*, *paneto*, *brioĉo*; (*SWEET ~*), *sukerbulko*  
CANDIED APPLE— *kandita pomo*  
CANDY (br. *SWEETS*)— *dolĉaĵoj*,

*sukeraĵoj*, *bombonoj*; (*HARD ~*, *DROPS*), *kandoj*, *dropsoj\**, *bombonoj*; (*SOFT ~*), *molaj bombonoj*; (*FINE ~*), *pralino*  
CANDY CANE— *stri-kano*  
CHEESEBURGER— *hamburgo\** kun *fromaĝo*, *fromaĝoburgero*, *fromaĝoburgo\**  
CHILI— *kapsikaĵo*  
CIDER— *pomsuko*  
COCA-COLA™— *kokakolo\**  
COL— *kola-sodo*, *kolao*  
COLESLAW— *brasiksalato*, *brasika salato*  
COOKIE (br. *BISCUIT*)— *kekso*, *biskvito*, *CHOCOLATE CHIP* — *kekso kun ĉokoladeroj*, *ĉokoladera biskvito*  
CORN BREAD— *maizpano*  
CORN CHIPS— *maiz-krakeroj*, *maiz-krakenetoj*  
CORN FLAKES— *maizflokoj*  
CORN-ON-THE-COB— *spadika maizo*  
CORNEDED BEEF— *spicita bovaĵo*, *peklita bovaĵo*, *salita bovaĵo*  
COTTON CANDY— *sukervato*  
CRACKER— (*sal*)*biskvito*, *krakeno*; *SWEET ~*, *GRAHAM ~* — *krakeno*; *SODA ~* — *soda biskvito*  
CREAM PUFF— *puf-kuk(et)o*; *krem-pufaĵo*  
CROISSANT— *korna bulko*, *bulko franca*  
CUPCAKE— *kuketo*; *taskuko*  
CUSTARD— *kremaĵo*, *flaŭno*

In the list, the preferred Esperanto terms are listed first, followed by other possibilities. Neologisms, new root words not found in the major Esperanto dictionaries (PIV or PIV-S), are starred. British variants are marked with a (br.).

Neologisms should be avoided, if possible, because they are a burden to the student. There are not many of them in the above list, and not all of them are necessary. And as I discussed in the last article, "bejgelo" can be dispensed with, as "kringo" has long existed with about the same meaning.

How to translate "hamburger" is a vexing question. It is not on the list, but its greasy cousin the cheeseburger is in the dock, so it's better to deal with it now. Hamburger is the German adjective formed from the northern German city of

Hamburg. PIV only lists "Hamburgo," for the city, but there is nothing to keep us from adding a separate lower case entry for "hamburgo." One Esperantist proposed "burgero," perhaps because he did not like the "ham" in "hamburger." However, ham in Esperanto is *ŝinko*. Furthermore, "burgero" contains the Esperanto pseudosuffix "er," making it look like a derivative of burgo (see PIV-S). Notice in the list that cheeseburger is also translated by the neologism "fromaĝoburgero," where *fromaĝo* is cheese in Esperanto. In my opinion, this is not an effective neologism, since either "hamburgo" or "burgero" can be formed into the Esperanto equivalent of cheeseburger, as shown.

One U.S. Esperantist who has spent time in Great Britain says that Esperantists only use "biskvito" for cookie in that country. This is not surprising, if you consider that the British use the word "biscuit" for cookie. However, Esperanto has a less ambiguous word in "kekso" (see PIV).

Note that chips (under "corn chips") is rendered into Esperanto by means of either of two derived words, "krak-er-oj" or "kraken-et-oj." Another example of a derived word is "ĉokoladeroj" for chocolate chips. I hope that the other Esperanto derived or compound words are understandable. Thus "brasik-salato" (coleslaw) is made up of two words meaning "cabbage salad."

English "cider" is not the same thing as "cidro," which is alcoholic in Esperanto, hence the translation "pomsuko" (apple juice) is better. I realize that apple juice and cider do not have exactly the same meanings in American English, but there are times when it is not advisable to render every English shade of meaning into Esperanto. If rendered, the words may not be understood in other countries.

The Esperanto words *flano*, *krakeno*, *kringo*, and *biskvito*, all of which occur in the above list, were the subject of my last article. In future articles, we will deal with letters D-Z.

[*Editorial note: Once again, we have to note a significant difference between British and American English. In Britain, the English word "cider" does mean cidro, and is alcoholic.*]

## ESPERANTO AT THE VOICE OF AMERICA

by Dr. William Solzbacher

*[The late Dr. William Solzbacher, member of ELNA and of the Esperanto Academy, worked for many years at the headquarters of the Voice of America in Washington, DC, and was largely responsible for its Esperanto activities in the early 1960's. Before his death, he graciously consented to allow ELNA to publish this excerpt from a report of his. All rights to this particular article belong to Dr. Solzbacher's estate, and any reproduction for publication should be carried out only with their express permission.]*

In the autumn of 1959, Vice President Richard Nixon and a large entourage went to Moscow for a highly advertised meeting with [Soviet Premier Nikita] Khrushchev, which included the famous "kitchen debate." On the way back, in Warsaw, the Nixon people found the streets crowded with persons waving green flags and talking and singing in a language called Esperanto. The year's Universal Esperanto Congress was being held in the Polish capital, with 3265 delegates. There was a substantial delegation from the Soviet Union, and there were reports that the Moscow News had begun to publish articles in Esperanto. There were large contingents of Congress members from Bulgaria, Hungary, and Czechoslovakia. There were many Germans, more from West than from East Germany.

With some astonishment the American visitors learned that the Polish radio broadcast in Esperanto several times a day. "Amazing!" "Are there radio stations elsewhere that broadcast in that language?" "Many." "Name one." "Radio Peking." "What about the Soviet Union?" "They do occasional programs in and on Esperanto, but not regularly. However, Bulgaria, Hungary, France, Switzerland, Italy, the Vatican, do." "What about the USA?" "Many American radio stations have broadcast Esperanto lessons. At the moment, the most important FM station in New York City is featuring an Esperanto course directed by one of the best Esperanto teachers in the USA, Doris T. Connor. Of course, many American radio and TV stations have had programs on such topics as 'Do we need an international language?' The organizers usually make sure some of the speakers favor Esperanto and others do not." "What about

the Voice of America?" Vice President Nixon asked George Allen, the Director of the United States Information Agency. "I'll look into that," Mr. Allen replied.

A few days later Mr. Allen called me to his office. We agreed that any Esperanto broadcasts of the Voice of America should be able to reach the whole world, especially areas representing a potentially large number of listeners. Target areas would include China, Japan, and Korea in the Far East, Australia, New Zealand and Canada, Brazil, Argentina, and the Caribbean in Latin America, the Soviet Union, including Soviet Central Asia and Siberia, all of Europe and the Near East, all of North and South Africa, Iran and Indonesia. Of course it would be impossible to broadcast the daily news, but we could assume that all potential listeners would be interested in America and in Esperanto. The Central Program Services Division of VOA was producing scripts that would be just right for use on broadcasts in Esperanto.

I mentioned a script on Mark Twain, programs on American Indians and Eskimos, and on the role of the US in the United Nations. What about the people who would do the broadcasting? I replied that in the District of Columbia, where the Federal Government is the principal employer, there were plenty of people with the proper security clearances who knew Esperanto and would be willing to cooperate. Some of them were on the staff of the Voice of America. I mentioned L. Dambriunas of the Lithuanian Service, who was also the author of a Lithuanian textbook for Americans, and was the nephew of Monsignor Dombrowski, one of the first Esperanto pioneers in Russia and the world. The Secretary of the Washington Esperanto Society was Clare Sponis, secretary to Congressman Roman Pucinski of Illinois. Another prominent member of the DC Esperanto Society was a Special Assistant to Senator Ralph Yarborough of Texas. I said I believed the Congressman and the Senator would also be willing to cooperate. The President of the DC Esperanto Society, R. Irvine, held an important position in the Federal Reserve System. I said I did not want to pretend the job would be easy, but I was sure it could be done. Both Congressman Pucinski and Senator Yarborough were

Democrats, but members of Esperanto organizations had useful contacts with Republican Senators and Congressmen who would also be willing to cooperate.

The Voice of America broadcast three series of Esperanto programs in 1960, a fourth in early 1961. The first series, consisting of six 30-minute programs, went on the air in March and April 1960, the second in June and July 1960, the third in October-November, the fourth in the spring of 1961. In order to reach audiences in different parts of the world at hours convenient to them and under conditions favorable for shortwave reception, each program was broadcast at different hours to each target area. The October-November series, for instance, which was devoted to the American elections, went over a network of six shortwave antennas. Two of these, located at Delano, California, used antennas directed at Latin America. Two others, at Tangier, Morocco, broadcast to Europe and the Near East. A transmitter at Okinawa was beamed to Japan and Korea, a transmitter in Manila to Southeast Asia, including Indonesia. Ambassador George V. Allen, Director of the US Information Agency, called the results of the Esperanto broadcasts "encouraging." Up to the end of November 1960, VOA received approximately 1230 letters in Esperanto from 72 countries, including about fifty from iron curtain countries. One year later, the figure was more than double as high.

The programs began with an address in elegant Esperanto by Ambassador Allen, followed by a program on how Congress works. The speakers were Congressman Pucinski of Chicago and Senator Yarborough of Texas and their assistants. Question-and-Answer programs were a regular feature of most VOA Esperanto programs. Some of the questions came from very important people. A question received in Esperanto from Mayor Franz Jonas of Austria's capital, Vienna, on why there was no Mayor of Washington, was answered by Senator J. Glenn Beall, the ranking Minority Member of the District of Columbia Committee of the US Senate. A question from a member of the Upper House (Senate) of the Swedish Parliament, Einar Dahl, on Women in Congress, was answered by Congresswoman Marguerite Stitt Church of Illinois, a member of the House Foreign Affairs Committee. A

question from the former Prime Minister of the Netherlands, Willem Drees, about the differences between the parliamentary system of government, as practiced in most European countries, and the Presidential system as it exists in the USA, was answered by Congressman Pucinski. Congresswoman Church and Congressman Pucinski gave part of their answer in Esperanto. In both cases, the rest of the answer was then read by an announcer. Senator Beall's voice was briefly heard in English, before his answer was read in Esperanto by an announcer. There was also a question from a prominent Polish scientist, Dr. Andrzej Grebecki. The answer was given by Dr. Alan T. Waterman, Director of the National Science Foundation, whose voice was briefly heard in English, and whose full answer was then read in Esperanto by an announcer.

The 1960 Universal Esperanto Congress was held in Brussels. Shortly before it started, Ambassador Allen informed me he had decided to send me to Brussels as his personal representative. This meant that I would be considered a government representative. The governments were Austria, Belgium, West Germany, the Netherlands, Sweden, the Education Ministers of France and Indonesia, plus personal representatives of the Prime Minister of New Zealand, and the Director of the US Information Agency. My name was at the tail end of the list, not because I was the least important, but, if you take the alphabetical list of country names, Austria is likely to be listed near the beginning, and the USA near the end.

I informed [VOA Program Manager] Barry Zorthian that I had told Ambassador Allen what I intended to say in the Opening Session of the Brussels Esperanto Congress, and that he had approved it. The opening day was a Saturday, so it would be necessary for me to check in with USIA Brussels on Thursday or early on Friday. The USIA Travel Service got me first-class travel reservations on the Belgian Airline. I was going to stay at a hotel near the building where most of the Congress sessions were going to be held.

In Brussels I was given an extremely friendly reception by the USIA people. One of them had worked before at the Voice of America in Washington. There was also a real spirit of camaraderie among the numerous radio and television reporters. All of them claimed to have listened to my Esperanto programs. The Chief of the Polish Government Radio was especially active. His predecessor as Chief of the Polish Esperanto programs had had a dis-

pute with the Communist authorities and had fled abroad. He shortly afterwards started Esperanto broadcasts from Sweden and Finland. He was in Brussels, too, and seemed to be on friendly terms with his successor. All Esperanto broadcasters were frequently photographed, especially by the editor of the magazine *Heroldo de Esperanto*, a Polish woman whose husband is Italian. The magazine itself was published in Spain at that time. It gave my appearance at the Brussels Congress much attention.

I had an interesting conversation with an elderly French woman who worked, and had worked for several years, at Radio Peking. She said that at that time very few Chinese had individual radio receivers. They listened to loudspeakers in restaurants, schools, public squares, etc. Those who did have individual receivers did listen to foreign broadcasts, including VOA in several Chinese dialects, and also in English and Esperanto, but knew that listening to foreign broadcasts could be dangerous. She said she had listened frequently to US broadcasts in Chinese and Esperanto. In China at that time, the government's attitude towards Esperanto was ambivalent. On the one hand, the richly illustrated magazine *El Popola Ĉinio* and the Esperanto programs of Radio Peking were considered important and effective means of foreign propaganda, while Esperanto classes in China and publications aimed at encouraging Chinese to learn and use Esperanto were considered "dangerous," because they might enable people in China to receive foreign "propaganda." The French lady said she knew many people who listened regularly to foreign broadcasts in Chinese dialects, English, French, and Esperanto, but were very cautious about it. So VOA shouldn't expect to receive many listening reports from China.

I found my participation in the Brussels Esperanto Congress very encouraging, and I was especially pleased by what my colleagues in the Esperanto Academy said. Several of them started Esperanto broadcasts of their own shortly after the Brussels Congress.

How many people spoke over VOA in Esperanto in 1959, 1960, and 1961? My guess would be between 60 and 70.

Audience comment on VOA programs in Esperanto was mostly highly laudatory. We were somewhat astonished, though, that the most praise we got was for an interview with a blind lawyer in New Jersey. He afterwards moved to California. The fact that a blind man could actually

make a good living by practicing law was unheard of in countries where blindness makes a person a charity case, rather than a person who can do most of the things that make a lawyer successful.

It has sometimes been claimed that it was a weakness of the VOA Esperanto broadcasts that VOA did not have an Esperanto Section like Radio Warsaw, Radio Peking, Radio Vienna, the Vatican Radio, etc., consisting of men and women working on nothing except Esperanto programs. It wouldn't have worked, however, because there were Congressmen and Senators who were almost constantly looking for VOA sections which they could close down to save money.

I worked for several months almost full time on the Esperanto programs, leaving the running of the Monitoring Staff, of which I was the Chief, to a deputy. But then, in early 1962, a Congressional Committee decided that the Monitoring Staff should be abolished. Having lost my job, I was given a new one: as an Assistant Policy Officer in the Program Manager's Office. My new job gave me a higher Civil Service grade, which meant more money, though not as much as you might think: in my new grade I could not be paid overtime.

VOA programs in and on Esperanto did not end with the four series in 1959-1960. VOA was repeatedly requested to provide programs in Esperanto to radio stations in France, Korea, and Japan, and frequently produced programs *about* Esperanto, with short inserts *in* Esperanto, in English, Japanese, Korean, Lithuanian, Spanish, and other tongues. When there was a newsworthy Esperanto activity going on somewhere in the USA or elsewhere, I frequently would produce a story in English—often with a short insert in Esperanto—for the Central Program Services Division of VOA.

In my discussion of the use of Esperanto at VOA after the four series of broadcasts in 1960-1961, I should mention congratulations in Esperanto in late 1977, at the party on my retirement in the Program Manager's Office, in the voice of Doris Connor. One of the roving reporters of VOA had gone all the way to Portland, Oregon, to get the message tape recorded. Several guests at the party in Washington said they were impressed and had not know that Esperanto sounds so beautiful. I commented that Doris Connor's voice sounds beautiful, whether it is in Esperanto, English, Portuguese, or Spanish, I said it was very nice of my colleagues in Washington to get this congratulation to me from as far away as Oregon.



*Kiam, kie kaj kial vi lernis Esperanton?*

Ĉirkaŭ 1976 dum mi pensis pri la problemo de milito mi ekopiniis, ke naciismo estas granda fonto de la problemo. (Tio ankoraŭ veras, ĉu ne?) Se ĉiuj sentus, ke ili estas parto de unu komunumo, eble estus malpli da milito. Do, mi konkludis, ke devus esti unu lingvo por ĉiuj personoj en la tuta mondo. Post du jaroj mi eksciis, ke tia lingvo jam ekzistas—Esperanto! Mi decidis, ke mi devus lerni Esperanton. Sed mi estas tre okupita persono kaj mi ne trovis sufiĉe da tempo. Unufojon en mia universitata klaso pri milito mi prelegis pri la valoro de Esperanto, kaj studento petis, ke mi diru ion Esperante. Mi tiam ne povis fari tion, sed mi decidis, “Neniam denove.”

Feliĉe, mi povis trovi alian profesoron, Rino Cassanelli, kiu konsentis instrui kurson pri Esperanto en mia universitato, kaj mi iĝis studento en tiu klaso. Tio estis en septembro 1979. Tre feliĉe, dum la vintro de 1980, Profesoro Pierre Janton el Francio venis al nia universitato kiel “Vizitanta Profesoro”. Li venis ne por instrui Esperanton (kvankam li estas tre konata esperantisto) sed por instrui lingvistikon. Denove, feliĉe, nur unu studento registris sin en la lingvistika klaso, do Janton instruis la Esperantan klason en kiu mi estis studento! Dum la sekvanta jaro mi helpis Profesoron Cassanelli instrui la Esperantan kurson, kaj en 1981-82 mi komencis instrui ĝin sola. Dum somero de 1984 mi ĉeestis la kursaron en San-Francisko kaj renkontis multajn esperantistojn, tre afabla kaj grava sperto por mi. Mi ankaŭ unufoje ĉeestis ELNA-n Kongreson (en Portlando) kaj Universalan Kongreson (en Vankuvero).

*Kiu estas la kampo, en kiu vi plej laboras por Esperanto, kian laboron vi faras en tiu kampo, kaj kial vi opinias tiun kampon aparte grava?*

Dum mi instruis Esperanton al studentoj en la universitato, mi rimarkis, ke tiuj studentoj jam studis aliajn fremdajn lingvojn. Mi opiniis, ke studentoj devus studi Esperanton antaŭ ol ili studas aliajn fremdajn lingvojn. Sekve mi iris al instruistoj kaj administrantoj en

la unuagradaj kaj mezgradaj lernejoj por persvadi ilin instrui Esperanton tie. Mi konfrontis brikan muron. Sed ĉe unu intervjuo kun adminstranto, li invitis instruistaron de la talentaj lernantoj. Ŝia sinteno estis tute malsama. Ŝi diris, ke Esperanto estus perfekta studobjekto por talentaj infanoj! Mi konstatis, ke tio estus la plej bona kampo por la instruado de Esperanto en la lernejoj. Plue la talentaj lernantoj estos la gvidantoj de la socio en la estonteco, ĉu ne?

Mi aliĝis la lokan, la nacian kaj la internacian organizaĵojn por instruistoj de talentaj lernantoj. Mi serĉis kaj trovis apudajn lokojn kie mi povus instrui Esperanton al talentaj lernantoj. Aparte mi provis konvinki la membraron de la internacia organizaĵo, ke oni devus instrui Esperanton al talentaj infanoj tra la tuta mondo kaj kuraĝigi ilin korespondi unu kun la alia. Mi faris prezentaĵon pri tiu temo en 1987 ĉe la Sepa Monda Konferenco pri Naturdotitaj kaj Talentaj Infanoj (World Conference on Gifted and Talented Children) en Salt Lake City.

En aprilo 1991 mi estis invitita partopreni vojaĝon kun aliaj membroj de tiu internacia organizaĵo el Usono kaj Kanado al Moskvo, Novosibirsk, kaj Budapeŝto por viziti lernejojn por naturdotitaj kaj talentaj infanoj tie. Mi volis ne nur vidi tiujn lernejojn sed ankaŭ interparoli pri Esperanto kun la aliaj vojaĝantoj. (Fakte pluraj el ili interesiĝis, parte ĉar ili vidis, ke mi havas esperantistajn amikojn, kiujn mi neniam antaŭe vidis, en ĉiuj urboj, kiujn ni vizitis.) Mi povis aranĝi en Budapeŝto viziti la lernejon en Budaörs kie la infanoj studis Esperanton dum du jaroj en programo subtenita de la Fondaĵo Talento. Mi tiam certigis planojn por tiuj infanaj esperantistoj viziti Hagon en aŭgusto 1991 por helpi min kun prezentaĵo pri Esperanto ĉe la Naŭa Monda Kongreso pri Naturdotitaj kaj Talentaj Infanoj. (Mi povis fari tion pro la kontribuoj de multaj usonaj esperantistoj. Denove, multajn dankojn al vi ĉiuj. Mi ankaŭ ricevis multe da helpo de la nederlandaj esperantistoj, kiuj provizis kaj aranĝis manĝojn kaj tranoktadon por la infanoj kaj la aliuloj kun ili.) Mi ankoraŭ opinias, ke ĉi tiu organizaĵo estas

fekunda tero por Esperanto ĉe kvankam ĝis nun mi havis nur malgrandan sukceson. Kelkaj instruistoj informis min, ke ili intencas komenci la instruadon de Esperanto en siaj programoj, kaj mi nun planas alian prezentaĵon por la Dekaj Monda Konferenco en Toronto en aŭgusto 1993. Mi intencas instrui Esperanton al infanoj el diversaj landoj, kiuj nun loĝas en Toronto por montri al la ĉeestantoj kiel rapide ili povas lerni kaj uzi Esperanton por komunikadi unu kun la alia.

Dum mi estis en Eŭropo la pasintan someron mi ankaŭ ĉeestis la Konferencon de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj en Voss, Norvegio. Tio estis agrabla sperto. Inter aliaj aferoj mi eksciis, ke Esperanto nun havas tre bonan ŝancon por iom da sukceso en la Eŭropa Komunumo. La kosto por la tradukado kaj la interpretado de la naŭ oficialaj lingvoj estas tre granda. Nova faktoro estas, ke la germanoj ne plu akceptos la uzon de la angla lingvo anstataŭ la germana en la oficejoj de la Eŭropa Komunumo. En Eŭropa Komunumo la kvanto de la denaskaj parolantoj de la germana estas preskaŭ 80 milionoj dum la kvanto de denaskaj parolantoj de la angla estas malpli ol 60 milionoj kaj de la franca ankaŭ malpli ol 60 milionoj. Multaj personoj nun konstatas, ke la Eŭropa Komunumo devas havi unu oficialan centran lingvon kaj ke Esperanto estas la sola akceptebla solvo. Ŝajnas probable al mi, ke antaŭ la jaro 2000 la Eŭropa Komunumo adoptos Esperanton en iu maniero kiel oficialan lingvon por kelkaj celoj.

Dume ni en Usono devas provi instrui Esperanton al niaj infanoj. Charlotte Kohrs kaj ŝia organizaĵo “Infanoj ĉirkaŭ la Mondo” nun produktas belajn kantojn kaj libretojn por infanoj. Ni devus volontuliĝi helpi la instruistojn, aparte la instruistojn de la talentaj lernantoj, en niaj lernejoj instrui Esperanton al la infanoj. Ni tre bezonas artikolojn en *Weekly Reader*, *Children's Highlights*, (kutime trovata en la oficejoj de dentistoj kaj kuracistoj) kaj aliaj revuoj por infanoj pri “Infanoj ĉirkaŭ la Mondo”, pri Esperanto, kaj pri Zamenhof, perfekta heroo por infanoj. Kiu faros tion por ni?



# RECENZE

**Auld, William (red.): *Nova Esperanta Krestomatio*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1991. Jubilea Kolekto Jarcento de Esperanto n-ro 5. 509 p. ISBN 92 9017 043 3. Bindita. Ĉe ELNA: Kodo NOV003, Prezo \$35.00 (nemembroj) / \$33.25 (membroj).**

Mi posedas ekzempleron de la *Fundamenta Krestomatio*, 17a eldono, tiu de 1954. Tiu Krestomatio unue aperis en 1903, kun la celo, provizi modelojn de konvenaj gramatiko kaj stiloj por nove bakitaj esperantistoj. Nu, kiel Auld atentigas en la Antaŭparolo de la *Nova Esperanta Krestomatio* (ekde nun NEK), inter 1903 kaj 1991, entute 88 jaroj, aperis diversspecaj stiloj, kaj eĉ la lingvo mem iom evoluadis, ĝis tia grado, ke "la enhavo de la FK plejparte tiel eksmodiĝis, ke ĝi ne plu ŝajnas aktuala" (p. 3). Tial la nuna verko, kiu celas plenumi la samajn celojn kiel la FK.

La planoj de la du libroj ĝis iu grado similas unu la alian. Post antaŭparoloj (kvar en la 1954-eldono de FK, nur unu en la jena verko) sekvas elektaĵo el la Zamenhofa Ekzercaro; verŝajne ili estas tute identaj. Sekvas tion proza parto, kaj finas poezia parto.

Oni povas dividi la prozaĵojn inter du kategorioj: fikciaĵoj kaj nefikciaĵoj. En ambaŭ verkoj la nefikciaĵoj estas same enkategoriitaj: "El Vivo kaj Sciencoj" kaj "Prilingvaj Artikoloj" ("Artikoloj pri Esperanto" en FK). Sed, krom se temas pri la klasika "Esenco kaj Estonteco" de Zamenhof, kiu aperas en ambaŭ verkoj, la enhavoj estas tute malsimilaj. En la nova verko la vivaj-sciencaj artikoloj estas relative lastatempaj: de Ĉen Baŭhe pri la Deka Azia Sportkunveno (verkita en 1987), de Marinko Gjiwoje pri la arĥeologio de Pompeio (1973), de László Ferenc pri medio-protektado (1974), kaj aliaj. La prilingvaj artikoloj estas malpli novaj; ili pliparte devenas de la 50aj kaj 60aj jaroj, krom se temas pri la Zamenhofa artikolo kaj la lastatempa "Psikologiaj reagoj al Esperanto" de Piron; la

enhavoj tamen restas aktualaj (vidu ekz. "Sociaj problemoj" de Waringhien).

Inter fikciaĵoj, Auld entute rezignis pri la "Anekdotoj" kiuj okupas preskaŭ tridek paĝojn de la malnova FK; kaj anstataŭ "Fabeloj kaj legendoj" kaj "Rakontoj", ni trovas "Rakontoj", kiu enhavas nur originalaĵojn Esperantlingvaj, kaj "Mondliteraturo", kun entute 14 ĉerpaĵoj kaj noveloj.

Inter la fruaj "Rakontoj" la novelo "En la brikejo" de Jozef Wasniewski eble ne taŭgas, malgraŭ interesa temo kaj matura stilo, ĉar la gramatiko de Wasniewski enhavas kelkajn stumbligaĵojn (nome, li ne bone atentigas la uzadon de -ig kaj -iĝ ĉe verbigitaj adjektivoj); sed "En la Dolomitoj" de Albert E. Styler, pri provizora perdiĝo en ne ĉiam afabla montaro, ja meritas la atenton de la leganto. Auld cetere aperigas "Kiel Mihok instruis angle" de Julio Baghy, tiel bedaŭrinde mankanta en la lastatempa kolekto *Trezoro*, pri la hungara militkaptito kiu ruze instruas Esperanton al sia rusa komandanto. Aliaj menciindaĵoj en tiu parto estas "La svatanto" de Leonard Newell, pri la stulteco de haŭtkoloraj antaŭjuĝoj; "Ĝermoj en rikolto" de John Francis, pri homa krueleco; kaj "La bleko de l' ŝargú" de "Liven Dek", pri amo kaj sekso sur fora planedo. Interesa estas, ke kelkaj temoj ripetiĝas inter tiuj 18 noveloj: vagado inter la montaraj belaĵoj (la menciita novelo de Styler kaj "La ĉarmo de ĉielmontaro" de Vladimir Glazunov); maljunaĝaj memoroj pri junaĝaj amoj ("La japana tetasaro" de Johan Hammond Rosbach kaj "Sonoj el fora juneco" de Rajna Konstantinova); kaj la strangeco de foraj mondoj ("Familia rondo" de Auld kaj la menciita novelo de Dek).

Zamenhof reprezentigas en "Mondliteraturo" per ĉapitro 3 el "La Predikanto", kiun li aperigis en *La Revuo* jarojn post kiam aperis FK. El la ceteraj, mi menciu nur ĉerpaĵojn el du el miaj plej ŝatataj Esperantlingvaj romanoj: *Sub la jugo* de la bulgaro Ivan Vazov; kaj *Gösta*


*Berling* de la svedino Selma Lagerlöf (el tiu lasta Auld selektis "La balo ĉe Ekeby"; mi mem estus preferinta "Kevenhuller", sed iu ajn parto el tiu libro meritas legadon!).

En FK Zamenhof neniel disdividas la poezion; sed Auld preferas distingi la Esperantajn (kaj lingve kaj teme) poemojn disde la tradukitajn. Zamenhof mem sukcesis transiri de la FK ĝis la NEK per po kvin poemoj originalaj en la du verkoj (mankas "Al la fratoj" en NEK; kaj je la apero de FK, "Preĝo sub la verda standardo" ankoraŭ restis neverkita). La sola alia travivinto estas Grabowski, per "La tagiĝo", kiu tamen ne aperis en FK (kie Grabowski estas reprezentata per ses tradukaĵoj); sed Auld mem proponas al la leganto la *Esperantan Antologion*, kie troviĝas aliaj poemoj el FK, ekz. de Kofman. Cetere, Auld kreas kvar subkategoriojn de Esperantlingvaj/Esperantotemaj poemoj, el kiuj la lasta ("Aliflanke"—satiraĵoj pri la Esperanto-Movado, ekz. "Estas mi esperantisto" de Baghy kaj "Esperanta eliksiro" de Schwartz) tute ne estus trovinta lokon en FK.

Fine, Auld proponas "Internacian Lirikon" kiel apartan fakon; en FK, la tradukitaj poemoj estis tute miksitaj kun la originalaĵoj. Cetere, en FK pliparte reprezentigas nur ĝermanlingvaj kaj slavlingvaj popoloj; sed Auld preferas aperigi po unu poemon el kiel eble plej multaj lingvoj, kaj tial aperas poemoj el entute 73 lingvoj, de la grandaj ĉina ("Longa disiĝo" de Li Bai) kaj angla ("La tigro" de William Blake) lingvoj ĝis la gvarania ("Al la patrino") kaj keĉua ("Balado el la dramo 'Olantaj'") lingvoj de Suda Ameriko.

Entute la *Nova Esperanta Krestomatio* prezentas tute modernan kaj aktualan prezenton al la nuntempa Esperanto. Kaj, por tiuj kiuj mem volas kompari la novan libron kontraŭ la malnova, oni promesas, ke baldaŭ aperos nova eldono de FK, kun novaj notoj de Gaston Waringhien.

Don Harlow



# LETEROJ

[Note: The letter column is a free-speech forum for members of ELNA. Views expressed are not necessarily those either of the editor or of the Esperanto League for North America, Inc. Comments for publication may be sent either to the address of ELNA or to Don Harlow (EUSA), P.O. Box 551, Pinole, CA 94564.]

At each of the United Nations Week in Nebraska events where he was the speaker or discussion leader, Dr. Ronald L. Glossop made a logical case for Esperanto.

The Esperanto-Language Workshop which was part of Nebraska Internacia-Lingva Asocio's Celebration of Esperanto annual Weekend, Oct. 26-27, was poorly attended. I send over 130 notices about the Workshop and the annual weekend. These went to over 90 people who had expressed an interest in Esperanto in Nebraska, plus ELNA members in nearby states, as well as to several Esperanto clubs. A flyer was given out at the ELNA Congress in Raleigh also. The only out-of-state attendee was Darlene Evans.

My husband and I had also attended the EGI weekend and found that annual event was virtually ignored by the members of EGI. At least we had six N.I.A. members at the Esperanto-Language Workshop and five guests. Among our guests was a teacher of Gifted Children from Omaha. Mary Spurgeon, ELNA and BEL member, was asked to plan and teach Esperanto for the Gifted by this teacher during the Workshop.

I had also sent 30 letters, flyers and an article about Ron Glossop to Schools and colleges in the Lincoln area. Two teachers at Doane College in Crete told me that the program sounded very interesting, but neither of them came to it. One did attend the colloquium about Esperanto at Doane College, however.

Yes, I know that to most this was a new concept and that the average person, teacher or not, feels that this is someone else's problem, language instruction is best left to the professionals, etc.

But I did feel let down by the Esperantists, both in the Rocky Mountain states and nearby ELNA members and also BEL members. Our Esperantists simply do not know how important to their own development as Esperantists taking part in Esperanto activities would be. Only Darlene

Evans seemed to sense this, she wrote on her preregistration form that she would come, even if on foot! Of course, Darlene is on the AAIE committee that is exploring ways to get Esperanto into the schools, so our workshop was perfect for her. And Dr. Glossop and she will be sharing more theory about this over the next few years, I believe.

We will continue to have our Celebration of Esperanto Weekends and I hope also to find funding for the Saturday workshop so that we can bring in a seasoned Esperantist to conduct it. And N.I.A. will set the date early in 1992, so that ELNA can include this on the calendar. I will do more personal contact with the Public Schools in our area and pursue what Ron Glossop got started at Doane College.

In Lincoln, N.I.A. will sponsor the Esperanto classes in 1992 because we do not need to have the usual limit of eight preregistered that the college requires. This fall we had seven and the class was not allowed to be held at the Community College.

I really enjoyed the last *Esperanto U.S.A.* Also my sons wrote to me about enjoyment of that particular issue. Just one small complaint. It is a bit uncomfortable for me to catch names such as Ron Glossop's or Rochelle Grossman's between the death announcements!!! I understand the symbols used, but it is still rather a jolt at first glance. Why not under "Esperanto-Agado," not "Pasoj"?

June K. Fritz

[We talk about "foreign-language teachers" so much that we forget that this doesn't mean "teachers of foreign languages" but "teachers of a (particular) foreign language," and that most such people, at least in my experience, have little interest in teaching a foreign language outside their own particular field. So perhaps language instruction is not best left to the professionals, at least as far as Esperanto is concerned. Regarding "Pasoj": I've already been criticized about it by a couple of sources much closer to home, and you won't be seeing that particular column any more... well, not under that particular title and in that particular format...]

1) You printed a letter from Juri Korsun, page 10, 1991 #6.

2) We asked the P.O. how much would it cost to send some clothes to Juri.

22 lbs. costs = \$48.00 by surface mail and \$142.00 by AIR MAIL.

Q. Have you any ideas or any contacts to send the 22 lbs. of clothes to Juri more effectively and more reasonably than by the P.O.?

Problemoj, problemoj, problemoj.

R. Mullins

[Sounds like they offered you a real deal; the League of East Bay Esperantists paid \$192 to send 60 lbs of clothes to Ukraine. Sometimes I feel that governments go out of their way to hinder this form of people-to-people aid...]

Pri *Esperanto USA*, mi havas nur malmultajn sugestojn por plibonigo. Ĝi ja, kaj jam, estas multe pli bona ol mi atendis. La multaj plibonigoj, kiujn vi enkondukis, preskaŭ komplete plaĉas al mi. Mi havas unu komenton kaj unu sugeston. Rilate la jara kvanto, por mi, ses numeroj estas perfekta. Mi ne deziras ke aperu sep aŭ ok. Kial? Nun mi apenaŭ havas tempon legi ĉion, kion mi ricevas. Mensogo. Mi ne havas tempon. Mi scias ke vi zorge elektas la plej gravajn aferojn, kaj pro tio mi legas la bultenon rapide post ĝia alveno. Simple estas afero de prefero—pro manko de tempo, pliaj numeroj ne pli bone servus min, sed male, fariĝus plia ŝarĝo.

Pri la enhavo, mi tre ŝatas vian elekton. Pli da eseoj de spertaj esperantistoj, kiel viaj "editorials" plaĉus al mi. Ĉu vi iam petis tion de la kolonoj de nia movado? "Perspektivo" (aŭ simile) de Sid Culbert, Duncan Charters, Cathy Schulze, Humphrey Tonkin ktp. interesus min. La leteroj, kiujn vi presas, ofte traktas interesajn temojn, sed ne malofte, tiom naive ke ili riskas misinformi pli ol informi. Mi tre ŝatas vian laboron. Dankon.

Derek Roff

[Mia propra celo por *EUSA* estas ok numeroj, po 16 paĝoj, en 1994; ĉu mi atingos ĝin, ĉu ne, tio dependas de la sumo buĝetita de la Estraro—kaj inter la Estraranoj troviĝas kelkaj kiuoj, same kiel vi, preferus reiri al la antaŭ-1988-aj takto kaj amplekso. Dum ĉi tiu jaro vi espereble vidos du artikolseriojn, unu de malnovaj kaj unu de novaj "kolonoj" de nia movado. La letero-rubriko ekzistas por permesi al la anoj de ELNA esprimi siajn opiniojn; se tiuj opinioj estas eraraj, mi provos ĝustigi ilin, sed grandparte dependas ankaŭ de aliaj por reagi ĝustige, same kiel vi kaj Jonathan pri la seksismo.]

Ĉar mi jam komencis verki ĝuste tian legolibron, priskribitan en la rubriko "El la C.O." en *EUSA* 1991(6), mi volas scii la

nomon kaj adreson de tiu progresanto, kiu plendis pri manko de taŭgaj legaĵaroj. Eble tiu volus helpi (kobaje).

Mi ankaŭ scivolas ĉu aliaj esperantistoj volus kontribui legaĵojn, kiuj uzas limigitan vortprovizon.

Vi sendube scias, ke Claude Piron eldons 405-subvortan bazan liston en *Vere kaj fantazie*. Mi forstrekis de tiu listo la vortojn, kiuj ne aperis en *Jen Nia Mondo 1*. Rezulte, mia baza listo enhavas nur 300 subvortojn (radikojn kaj afiksojn). La unua legaĵo uzas nur tiujn. Poste ni aldonas aliajn.

La legolibro estos en du apartaj libretoj. La unua entenos la Esperantajn legaĵojn. En la dua estos tradukoj de novaj vortoj, kaj helpiloj pri kunmetitaj vortoj, kiuj povus esti malfacilaj por komencantoj.

Pro pedagogiaj kialoj, mi preferas NE meti la tradukojn sur la paĝo, kie troviĝas la legaĵo, sed mi opinias, ke la helpila libreto kontentigos la legantojn.

Martha W. Evans  
342 Hill Avenue  
Grand Junction, CO 81501

[En la nuna stadio de evoluado de Esperanta pedagogiko, ŝajnas al mi, ke ĝuste tiaj libroj estas necesaj. En tiu kampo laboras, krom s-ino Evans, ankaŭ Claude Piron, Marjorie Boulton, Stefan MacGill, kaj aliaj.]

Mark Stephens, in his letter in issue 1991(7), refers to the decision of the Board of Directors to "raise various membership rates" and states this disturbs him and will lose members.

What the Board did was to simplify the dues structure. Regular dues show a small increase from \$25 to \$30 a year. All people of limited income pay \$15—a very modest fee. People affected by the current economic downturn can pay this reduced fee. Thus we should not lose members because of our dues structure. Considering that all members receive an excellent NEWS-LETTER, a complete book Catalogue, the ELNA Address List, and ELNA Handbook, members receive a great deal for their money.

The Free Postal Lessons continue to be a good source of new members. Of the 99 new members listed in the recent membership update, one third are postal students. With continuing good service by the current ELNA staff and the tutoring a training of postal students by Bill Schulze and me, I see no cause for concern for ELNA's growth.

Cathy Schulze

[I'm not sure that I can agree that the

dues change was a "simplification," since the number of categories remains the same and the category "limited income" is not as well-defined as the dropped "65+" category. Possibly because of this latter point, it appears that a smaller proportion of our members are signing up under limited-income provisions than used the old category.]

Don Harlow, en sia EDITORIAL (*Esperanto/USA* 1991(7)2) demandis, ĉu estus preferinde uzi teknikajn vortradikojn jam en la internacia vortrezoro, ol novajn vortojn speciale konstruitajn el Esperantaj eroj. Li kontrastis inter *enĉilado* (de la meksikia "enchilada") kaj *flanulaĵo*. Sen indiki kiun mi persone ĝenerale preferus, mi rakontas tiun ĉi rilatan sperton.

En artikolo verkita por *El Popola Ĉinio* (januaron 1991 eldonita) mi estas skribinta, ke mi ne toleras (aŭ almenaŭ ne ŝatas) *ĉilisaŭcon* (chili sauce). La redaktistoj, ne sciante, ke tio rilatas al la forte spica oleo de kapsiketoj tre (eĉ tro) ofte uzata en okcident-ĉiniaj manĝaĵoj, en la presaĵo anstataŭis mian vorton per *sojo*. Nun, tra la tuta mondo (pli precize, tra la legantaro de E.P.Ĉ.), oni supozas ke mi (kvankam edziĝinta kun ĉinino, bonega kuiristino eĉ) ne ŝatas sojon. Tamen tio ne estas vera. Preskaŭ ĉiutage ni uzas (kaj mi ĝojas pro tio) sojaĵojn, ĉu *sojsaŭcon* ĉu *sojfromaĝon*. (Mi ne kuraĝas skribi *tofuon!*)

Ralph A. Lewin

[Eble ili supozis, ke vi priskribas saŭcon indiĝenan en iu difinita sudamerika lando, ĉar nur tiun difinon por la radiko ĉili' mi trovas en PIV. Kiam, cetere, oni reeldonas la Gastronomian Terminaron de Erhard Urban?]

Kvankam mi estimas la laboron de Rüdiger Eichholz por la terminara evoluo kaj opinias ke ĉe tiu laboro li preskaŭ ĉiam respektas la egalajn rajtojn de la uzantoj de Esperanto, tamen mi opinias ke li forvadis de la demokrateco en sia artikolo "Pri terminoj" en n-ro 1991(7). Tie li skribis, "Faksimil' estas substantiva radiko, kiu ne esprimas agon, tial oni ne povas aldoni al ĝi la sufikson -il'!"

Ĉu? Mi tuj malpruvu tiun aserton: faksimililo. Jen, mi faris tion, kion s-ro Eichholz diris ke oni ne povas fari.

Pli serioze, se li volis diri ke oni ne rajtas fari tion, kial ne? Ĉu simple ĉar s-ro Eichholz malpermesas? Ĉu d-ro Zamenhof tion malpermesis? Ĉu la tuta uzantaro de la lingvo interkonsentas ke tio mallaŭas la gramatikon? Ĉu tia vortfaro

kaŭzus miskomprenojn? Ne evidentas la respondo, sed la komento de s-ro Eichholz povus miskredigi novajn esperantistojn. Oni daŭre eksperimentas por igi Esperanton eĉ pli utila ol ĝi jam estas (vidu la artikolon de David Jordan en la dua numero de *Esperantic Studies*).

Supozu ke mi sentus bezonon pri vortserio kiu nomu la ilojn per kiuj oni produktas aĵojn. Ekzemple, ĉe mia komputilo mi faras diversajn bazajn dosierojn kiuj havas la ĝustajn formatkombinojn por tipaj dokumentoj. Do, iun por leteroj oficaĵaj, alian por leteroj privataĵaj, alian por formatkombinoj por tipaj dokumentoj. Do, iun por leteroj oficaĵaj, alian por leteroj privataĵaj, alian por enlaborejaj memorandoj, alian por la afiŝo ĉeporda kiu anoncas miajn konsulthorojn. Kiam mi volas produkti dokumenton, mi ekuzas la koncernan bazan dosieron kaj plenigas ĝin per la tiam bezonata teksto. Kiel mi nomu tiajn bazajn dosierojn? Ĉu ne "oficleterilo", "memorandilo", "afiŝilo" ktp estus eblaj nomoj? Ne la solaj ebloj; oni povus ankaŭ diri "praafiŝo", "ekafiŝo", "afiŝmalido", "afiŝonto", "afiŝbazo" ktp—jen la kreigecko de Esperanto. Sed kial mi ne rajtu aŭ ne povu ankaŭ per "afiŝilo" esprimi mian ideon? Kial mi ne rajtu diri "ombrilo" anstataŭ "sunombrelo"?

Kiam antaŭ multaj jaroj oni ekuzis la vorton "gedormi", eble s-ro Eichholz samprincipe protestis. Sed la ordinaraĵ uzantoj ĝuis la trafan lerton de la vorto kaj adoptis ĝin.

Do, se s-ro Eichholz povas ne nur aserti ŝajne arbitran gramatikan malpermeson sed argumenti por la malutilo de malkonsilataj konstruoj, mi invitas lin i.

Prof. Jonathan Pool

[Laŭ la ĝenerale akceptata teorio de Kalocsay kaj Saussure pri la vortformado en Esperanto, ĉiu radiko havas ian internan gramatikan karakteron—nome, frat' estas substantiva, ruĝ' estas adjektiva, kur' estas verba, ktp. Tamen, kiel ĉiu komencanto scias, aŭ devus scii, oni povas aldoni kiun ajn gramatikan finaĵon al kiu ajn radiko, aŭ tigo, kaj tio kvazaŭ donas al la rezulto la gramatikan karakteron indikitan de la finaĵo. Simile, kiam oni aldonas al radiko aŭ tigo afikson, kiu postulas radikon aŭ tigon de difinita karaktero, ĝi trudas al tiu radiko aŭ tigo la necesan karakteron. Do ŝajnas al mi, ke vortoj kiel faksimililo kaj malpurigero (ankaŭ proponita de s-ro Patterson, al kiu respondis s-ro Eichholz) estas facile tolereblaj kaj eĉ, en certaj cirkonstancoj, tre trafaj. Tia estas la genio de la lingvo.]

**[A couple of last blows against sexism in Esperanto.]**

Thank you for your Postal Course lessons. I found the first one clear and helpful.

I am learning Esperanto at the urging of a friend. Although at first I was not interested, I am finding it exciting and intriguing. It triggers some deep kind of awareness about language in general which I never experienced learning French or German.

One thing that turned me off Esperanto before starting to learn it and that still turns me off is the sexism in certain words. The most offensive one I've encountered so far is the word "Patrino" for "Mother." It's an historical tool of patriarchy to reverse the natural order and claim that womyn are mutations of men, Athena popped from Zeus's brow, male is the default assumption. In actual fact, the Goddess preceded "God the father" by some 20,000 years; the female is the default in asexual species; Mother pre-existed Father.

A simple solution to this reversal is to add the word "Matro" to mean mother. A wonderful extension of this would be to make both Matro and Patro gender-neutral words, referring to a role rather than to genitals. For example, a Patrino could then be a female father and a Virmatro could be a male mother.

I think some solution to sexist constructions in the language is in order since Esperanto has such miraculous possibilities and global intentions.

Kathryn Woods

I agree wholeheartedly with the letter from Diane Gorgen and Craig Wallace in issue 6. I only recently began learning Esperanto, and within an hour of starting I noticed the lack of a masculinizing suffix, rather odd for such an otherwise (as far as I know) logical language. It seems rather silly to add the prefix *ge-* when speaking of both sexes collectively; I would think that it could be swapped for *-iĉ*, the masculinizing suffix that you mentioned, but I can find no mention of it in any of my dictionaries. Does anyone use it besides Georgo Kamaĉo?

Stephen B. Cobb

[See also letters in the last issue and the Guest Editorial in this one.]

Could not some *samideano* of more expertise in political science than I write a short introduction to the Constitution of the United States, or to our foreign policy, or both? About all one can find on politics

in Esperanto is translations of old Gorbachev speeches, and they may not have been selling like hotcakes since last Xmas. One can find out a lot thru Esperanto on the late great Soviet Union, but next to nothing on the other superpower?!

Is it any wonder some people learn English instead of Esperanto, or in addition?

Richard A. Earnhart

[You can find old Gorbys (and Chernenko, and Andropov, and even Brezhnev!) speeches in Esperanto because, at some time in the early eighties, the government of the USSR decided to use Esperanto, at least to some extent, to promote their point of view. The US government has yet to make such a decision. Still, it would be nice to have such American state papers as the Constitution and The Federalist Papers available in Esperanto. As to US foreign policy ... you'd have to understand it before you could write about it, which leaves some of us out in the cold.]

Koran dankon pro aperigo de mia letero en Esperanto U.S.A. 1991(7). Jam kelkaj samideanoj reeĉis la alvokon subteni la plej aktivajn Esperantistojn el eksa Sovetio elmigri, enradikiĝi en Usono kaj ekaktivi en E-movado. Kelkaj bonaj sanoj sin turnis al mi, kaj mi donis la adresojn laŭ kiuj ili skribu. Mi menciis nur la Esperantistojn en iama USSR, kiuj jam intencas elmigri kaj petis min pri subteno. La dezirantoj povus atingi plurajn, se ili anoncu alvokon en, ekz. *Moscow News*, publicata en kelkaj lingvoj en Moskvo—ankaŭ angle. Eblas skribi ankaŭ al eksa USSR E-organizaĵo kaj respublikaj E-unioj. (La adresoj—en UEA Jarlibro-91.) La afero estas intima, ĉar dume oni elmigras en Usono nur al la plej proksimaj parencoj (gepatroj, gefiloj, gefratoj), aliaj dezirantoj atendas dum jaro aprobon de la US Ambasadego en Moskvo. Tamen estas ebleco helpi ankaŭ al aliaj grupoj, uzante subtenon flanke de Sinagogoj, Eklezioj kaj Moskeoj. Vi ankaŭ povas trovi Esperantistojn, kiuj gaste venis al nia lando kaj volus ekloĝi permanente. *The New York Times*, 01/26/92 sciigas ke pli ol 30,000 rusoj restas en Usono pli longe ol iliaj vizitoj permesas. Estas ebleco trovi ilin per aperigo de anoncoj (nepre en Esperanto, kun angla traduko—por redakto). La anoncoj eblas sendi al la ruslingvaj *Novoye Russkoye Slovo*, 518 8th Avenue, New York NY 10018, aŭ al *Panorama*, 501 S. Fairfax Ave., Los Angeles CA 90036.

Alex Karkovsky

**ESPLORKONTRAKTA ANONCO**

Scienca fonduso serĉas kunlaboranton por unufoja esploro-projekto pri Esperanto-instruado kaj Esperanto-lernado. Daŭro proksimume 2-3 semajnoj. Salajro ĝis \$2000, laŭ kvalifikoj. La kunlaboranto prefere legpovu Esperanton, la anglan, kaj la germanan; konu la fakon apliklingviko, edukiko, aŭ psifiko; kaj proksimu al granda esplora biblioteko. Petu informfolion ĉe Esperantic Studies Foundation, 3900 Northampton Street N.W., Washington DC 20015.

**Daŭrigo de paĝo 1**

ĝueble kiel traduki. Kaj mi ankaŭ ricevis multe da helpo de mia longedaŭra plumamiko, Reĝ Reid. Mi multe lernis per la peno de miaj amikoj.

Kaj nun mi laboras pri la antaŭlasta (sesdeka!) ĉapitro de la libro. Mi ne volas rapide fini la taskon. Kaj eĉ post kiam mi finos la lastan ĉapitron, kaj miaj amikoj faros siajn kompletajn korektaĵojn, mi ankoraŭ havos pli da laboro. Mia stilo ŝanĝiĝis dum la tri jaroj, kaj mi esperas, ke mi nun pli klare skribas. Mi devos redakti la tutan. Mi ne scias, ĉu iu volos eldoni ĝin, sed mi ne ĉefe faras la taskon por tio.

Mi sugestas, ke aliaj esperantistoj kiuj, kiel mi, bezonas manieron kaj celon por plibonigi sian Esperanton, kaj kiuj sufiĉe amas libron por doni ĝin al aliaj esperantistoj, konsideru ĉi tiun metodon.

# LEARNING ESPERANTO IN THE MARGINS OF A DAY

by Joseph Carson

My name is Joseph Carson and I am committed to learning Esperanto. I am an engineer who had no language courses in college. Two years ago I had the opportunity to read a paper that Allan Boschen presented at a meeting of the American Society of Engineering Educators titled "Potentials for the Application of Esperanto in Education." I decided that if I really considered myself an intellectual, I had better get rid of the attitude "if you don't speak English, what's wrong with you!" I made an appraisal of the cost of learning Esperanto and the benefit I hoped to derive from its study. I realized that very efficient time utilization would be the crucial factor for me to succeed in this endeavor. I am fortunate in having some disposable money to invest in technology to make the learning of Esperanto or other subjects easier, but with respect to time, that most democratic of institutions, I have 168 hours a week and they're all committed.

In the thought that I am not alone in this situation, and to spur some thoughts on how the learning of Esperanto can be made to incorporate some instructional technology applications and learning psychology principles, and so perhaps can be made more attractive to adults with many responsibilities and limited time, I submit my experience for your attention.

In deciding to learn Esperanto, my prime consideration was when I could do it. From keeping careful track of how I spend my time and which of my current activities could also allow concurrently the learning of Esperanto, I noted these: driving time, aerobic exercise time, time spent in the bathroom and dressing, time spent eating my lunch at my desk at work, and time spent in routine phone calls at work. While not all of the time during these activities could be spent learning Esperanto, some could be, and I figured these activities totaled almost 20 hours a week.

I purchased *Jen Nia Mondo I* and got started. Almost immediately I ran into problems. I just would not or could not stop the tape of the dialogue often enough to repeat it to work on my pronunciations. I found my attention frequently lapsing when listening if I did not have the written dialogue in front of me, which was a rare occasion. It took me a long time to realize that the syllables in Esperanto generally

end after a vowel instead of a consonant as in English, and that the Esperanto dictionary I had did not show syllables. (This should be emphasized in early lessons.) I also found that at about lesson 8 the speaking rate increased, which made following the tape nearly impossible at first without the written dialogue. The audio quality of the tape is adequate but far from excellent. (And I have enjoyed listening to many recorded books on tape while driving, to make a fair comparison.)

I'm a nuclear engineer who served in the US Navy on submarines. When I'm not happy about a situation, I endeavor to fix it!

I used readily available technology to address these problems.

1. I used a variable speed tape recorder (Radio Shack \$80) with another tape recorder to make a reduced speed copy (0.8 of normal) of the dialogue of *Jen Nia Mondo I* to help me understand it more easily. I then made another copy of this tape into which I inserted pauses after every phrase to allow me to repeat what I had just heard. (If you have a pause button on your tape recorder, this is very easy to do.) If you have questions about how to do this, go to any Radio Shack for help. This made learning much easier, as I could understand the dialogue more readily, while repeating it as I went along kept my attention much better focused, and if I missed several words it was much easier to refocus my concentration and not be lost.

2. I used a photocopy machine to make copies of only the written dialogue from the book by using cut and paste techniques. I enlarged these copies somewhat so that they would be easier to read, taped to the bathroom mirror when I was shaving or brushing my teeth. I also marked the words in the dialogue with vertical lines to show the division of syllables—a trick that made recognizing the sounds of the syllables much easier.

3. I used old business cards to make flashcards of vocabulary words, Esperanto on one side, English and a mnemonic to help remember the word on the other side. (Any decent size library will have books on memory techniques to show how to double the fun and efficiency of learning vocabulary by using imaginative mnemonics—just look up memory in the subject catalog, or try the *Memory Book* by Lucas and Loranye which was a best seller

18 years ago.) Blank calling cards can be purchased from a printer at about \$5 a thousand.

4. I purchased a microphone and mike stand (\$20) so that I could make my own tapes of vocabulary words with mnemonic cues.

So how did this all come together? I set up a tape recorder in my bathroom to play tapes of the slowed down, with pauses after every phrase, dialogue from *Jen Nia Mondo*. On the bathroom mirror I taped an 8x14 photocopy on which were the dialogues of four lessons, marked to show the syllables. As I went about my business in the bathroom and dressing, the Esperanto tape would be playing. In the car I would listen to the same tape (actually another copy) on a portable tape player powered from the cigarette lighter through an adaptor. (If your car does not have a tape deck, these items can be purchased very inexpensively—just cover them with a towel when parked.) While doing aerobic exercise, I would listen using a personal tape player. At work I purchased a telephone headset. This made it easier to review flashcards when engaged in routine phone conversations. I also made my own tapes of vocabulary words and rules for grammar using mnemonics to which I listened frequently.

Is it working? I'm learning Esperanto and making use of time in which most people's mental utilization is not usually very high.

It took about a year for me to develop and implement all the ideas I have mentioned here. If I had not done so I would have given my effort up. My time is simply too precious for me to invest in activities which take away from my family or many other responsibilities unless I am getting good equity in return for it. I hope the detail I have included in this article is taken as a sign of respect for the time its readers invest in considering it.

Last fall ELNA started its correspondence course using *Jen Nia Mondo* as its text. I had finished *Jen Nia Mondo I* on my own, but signed up for *Jen Nia Mondo II*. It was a great experience which I recommend highly to anyone considering learning Esperanto. My correspondent, Hans Lamprecht, gave me very detailed correction of my written lessons. For the small amount of money asked for the course, I received a great deal of attention.

## DEKLAROJ DE LA KANDIDATOJ

[Jen la ideoj kaj proponoj de la ĉjaraj kandidatoj por la ELNA Estraro.]

### THOMAS ECCARDT

Esperanto ne nur estas lingvo, sed ankaŭ movado. Por pli bone disvastigi Esperanton en Usono, mi strebos plifortigi la interrilatojn inter ELNA kaj la lokaj kluboj. Preferinde la kluboj estos suborganizoj de ELNA, kaj ĝuos la profesiismon de tutlanda organizo, ekzemple, pere de klub-gvidlibro (vidu mian leteron en *Esperanto U.S.A.* 1991/7). Eble oni povus profiti studante la strukturon de aliaj tutlandaj organizoj kiel Red Cross, Greenpeace, ktp. La celo estus pliproksimigi ELNA al ĝiaj anoj, kaj alporti la parolatan lingvon al la regionoj. Bedaŭrinde, usonanoj legas malpli kaj malpli, sed ELNA devas ne lamenti, sed krei vidbendan kurson de Esperanto, kiun oni povus vendi kaj montri pere de "public access channels" aŭ "Public Television".

### ELLEN M. EDDY

Mi volas vidi la monbazon por la ĝenerala funkciado de ELNA el pli diversaj fontoj. Mi anticipas ke la lastetempa falo de la interezo limigos la kapablon de la Kapitala Fonduso provizi la saman nivelon de subteno al la programoj kiel antaŭe. Ni devas enketi pri aliaj eblecoj. Mi ankaŭ volas vidi pli da komunikado inter individuaj membroj, la diversaj kluboj, kaj la centra organizo. Ĉiu ero de la ligo gravas al la sukceso de la tuto. Por ke ĉiu membro povas scii pri la laboro de la diversaj programoj de ELNA, mi volas vidi la eldonon de la Jaraj Raportoj similaj al tiuj kiuj estis senditaj al ĉiuj membroj en 1988 kaj 1989. Tiel la tuta membraro povas vidi la agadon de ELNA, ne nur tiuj kiuj povas ĉeesti la Jarkunvenojn.

### GARY GRADY

Krom lokaj kunvenoj, mankas en Usono multaj medioj por parolata Esperanto. La nacia kongreso okazas nur jare kaj por multaj homoj postulas tro da tempo. Krome, ĝi okupiĝas precipe pri la aferoj de ELNA mem, kaj oni eble preferus diskuti pli diversajn temojn.

Mi opinias, ke ni bezonas naciajn Es-

peranto-semajnfinojn en diversaj lokoj tra la jaro. Kompreneble, grupoj jam starigas regionajn kunvenojn; mi nur sugestas ke ELNA helpu ilin per kunordigo, konsilo, kaj nacia reklamado. Kaj la loka kaj la nacia organizaĵoj gajnos.

Alia grava manko estas vidbendoj en la lingvo. ELNA povus instigi la enscenigon de vidfilmoj per jara konkurso kaj filmfestivalo. Poste (kun permeso) la aŭdvida servo povus disdoni ilin, aŭ la libroservo povus vendi.

Kiel estrarano, mi subtenus tiajn ideojn por fari Esperanton eĉ pli interesa kaj utila por nia membraro.

### ROCHELLE F. GROSSMAN

Dum la lastaj kelkaj jaroj, ELNA plifortigis kaj pliboniĝis. Ni nun bezonas ankoraŭ pli da anoj por montri al la usonanoj kiom da personoj subtenas la internacian lingvon. Mi aplaŭdas la 800 numeron kaj esperas, ke ĝi alportos multajn petojn kaj eventuale novajn anojn al ELNA. Ni devas kapti la respekton de lingvistoj, profesoroj, ĵurnalistoj, bibliotekistoj kaj sciencistoj pere de la alta profesia kvalito de niaj kongresoj, intervjuoj kaj broŝuroj. Mi tre fieris pri la ELNA kongreso en Meksikurbo en 1990 ĉar multaj ne usonanoj kiuj ĉeestis entuziasmiĝis pri la bona kaj altkvalita kongreso. Ni devas intensigi nian laboron kun neesperantaj organizaĵoj kiel UNA/USA, MLA, NEA, Mensa, Kiwanis, Lions kaj Toastmasters por ke ili sciu ion pri Esperanto kaj kiel ni povas helpi unu la alian. ELNA devas inspiri la lokajn klubojn tra Usono kun pli da interesaj materialoj kaj kun varmaj interrilatoj. Se mia kandidateco sukcesas, mi laboros por efektivigi ĉi tiajn ideojn.

### SALLY LAWTON

Mia celo estas fortigi la uzadon de Esperanto. Mi kredas, ke en la estonteco, eventuale, Esperanto estos multe pli uzata por interkompreno, por edukado multflanke, ĉar estos ĉiam kreskanta bezono mondskala por tia lingvo kia Esperanto.

Ne ekzistas vera konkuranto, tiel facile lernebla, neŭtrala, uzantamika komunikilo. Sed ĝis nun, Esperanto estis utila lingvo por nur malgranda aro da homoj malrapide kreskanta. Fakte, lernado de lingvo necesas pli malpli

daŭran periodon da uzo por akiri vortprovizon kaj fluecon. Por ĉiu lingvo, inkluzive la denaskan, la procezo ne finiĝas por homoj kiuj volas lernadi per aŭskultado, legado, uzado.

Flanke al utileco, ĉiam Esperanto allogis homojn kiuj ĝuis la defion de memspertigo kiel en iu ajn arto, sporto aŭ ludo. Tiu defio povas konduki al verkado aŭ parolado aŭ instruado. Kaj la mesaĝo kutime inkluzivas idealojn de internacia kompreno survoje, espereble, al paca mondo.

Se nur pli da homoj lernus la lingvon! Kiom pli? Eble televido povus vekti intereson kaj helpi instruadon, ĉar ne svarmas aŭ avidaj studentoj aŭ spertaj instruistoj. Eble anglalingva vidbenda historio de Esperanto povus esti inspira komenco.

Mia speciala intereso estas edukado de infanoj kaj junuloj. Mi kredas, ke la historio de Esperanto estas belega ekzemplo de la povo de meminstruado kiu estas grava leciono ĉiam por lernantoj (k aliaj). Ankaŭ Esperanto atentigas lernantojn pri la monda lingva problemoj kaj prezentas eblan solvon. La infanoj povas sperti la lernadon de nova lingvo sukcese, kio instigos ilin, mi esperas, lerni lingvojn pli sukcese dum sekvaj jaroj. Eble ili elektos mem studi Esperanton iam. Nun multaj homoj ne scias pri Esperanto kaj sekve neniam povas elekti lerni ĝin.

### CHUCK MAYS

Mi kredas, ke la estonteco de Esperanto en Usono (kaj ELNA mem) ne estos bona se ni ne havas fortan junularan movadon. Ĉar la tasko estas tiel granda ke neniu deziras volonti esti la pirespondeculo, mi opinias ke ELNA devus ne dependi sole de volontulo(j), sed devos konsideri dungi personon por starigi kaj gvidi junularan movadon. La taŭga persono ne necese devos labori plentempe aŭ en la centra oficejo.

Ankaŭ mi opinias ke la lokaj, regionaj kaj aliaj Esperantaj organizaĵoj bezonas pli bonan interkomunikadon (networking).

Kiel estrarano mi laborus laŭ la deziroj de la membreco de ELNA sed ĉefe por antaŭenigi ĉi tiujn du gravajn bezonojn.

## THRIVING ESPERANTO ACTIVITIES IN QINGDAO, meeting site of the 5th Pacific Congress of Esperanto

(from *The People's Daily, Overseas Edition*, Feb. 14, 1992)

Through Esperanto, Qingdao, a city on China's northeast coast, is actively developing international travel, cultural exchanges, and commercial trade in science and technology, thus promoting the Esperanto movement there, and facilitating the city's opening to the world as well.

Qingdao's Esperanto movement has had a long history of over eighty years. As early as the thirties many progressive youths organized Esperanto associations. In 1985, Qingdao established its Esperanto League, taking advantage of the "East Wind" (here means 'policy') of opening and reform.

In the past years Qingdao has won obvious achievements in promoting and popularizing Esperanto, though with difficulty. With the cooperation and support of the relevant departments, Qingdao Esperantists have persistently worked for all levels of Esperanto teaching. They have offered more than 50 courses in Esperanto in some of the kindergartens,

elementary schools, middle schools, colleges, universities and workers' clubs. About 3,000 people have learned the language at school, and around 1,000 through correspondence courses. Besides, Esperanto has been listed as a compulsory course at Qingdao Tourism School; thus a comparatively steady and qualified team of Esperanto speakers has been formed. Three Esperanto organizations have regular academic activities for Esperantists to practise and use the language, as a result of which there is a kind of "language atmosphere" in the city.

In the effort of popularizing Esperanto, Qingdao also pays special attention to making use of the news media. Five films on the special subject of Esperanto have respectively been released through the joint work of the Qingdao Esperanto League and Qingdao TV Station, among which "La Espero" (The Hope) has become an Esperanto teaching film for the Central TV Station of China. It was shown at four international Congresses of Esperanto, and three times won prizes at home and abroad. In order to lay a solid foundation of the language, they also started to publish "La Mondo," an authentic Esperanto magazine for Chinese Esperantists.

Qingdao has tried to tie the Esperanto movement with the policy of opening and

reform. They have received trade groups of Esperantists from the United States, Japan, South Korea, Belgium, Yugoslavia and other countries. "The Esperanto Watch" has opened the door to the international market for its producer, the Qingdao Watch Factory. The T-shirt with "Mi Amas Esperanton" (I Love Esperanto) made by the Qingdao Cangkou Textile Factory has been attractive to Esperantists all over the world. Not long ago, with the help of the Qingdao Esperantists, "The Chinese Exhibition of Industrial Technology and Products" was displayed in Belgium, and 25 kinds of products made in Qingdao were completely sold there, with the help of the Belgian Esperantists. Afterwards they signed four business contracts with traders from other countries.

It has been decided that the 5th Pacific Congress of Esperanto will be held in Qingdao this coming summer because of its outstanding contribution to the Esperanto cause.

(trans. Chien Mingchi)



President: Angela Harlow (1993), P.O. Box 551, Pinole, CA 94564, tel. (510) 222-0187

Vice President: Dr. Grant Goodall (1993)

Secretary: Virginia Stewart (1992)

Treasurer: John B. Massey (1994)

Other Board Members: Prenda Cook (1992), Frank Helmuth (1992), Dr. Jonathan Pool (1992), Dr. E. James Lieberman (1993), Sherry Wells (1993), David Wolff (1993), William R. Harmon (1994), William H. Schulze (1994), Mark C. Stephens (1994)

Commissioners: Don Coleman (Local Clubs), John Dale (Legislative Affairs), Jim Deer (Tape Service), David Gaines (Youth Affairs), Lucy Harmon (Travel Affairs), William R. Harmon (Central Office), Dorothy Holland-Kaupp (Correspondence Courses), R. Kent Jones (Science & Technology), Dr. Julius Manson (United Nations), John B. Massey (Wills and Gifting), John B. Massey, William H. Schulze and Sidney V. Steinberg (Kapitala Fondusa Komitato), John Mathews (Service Clubs), Catherine Schulze (Postal Course)

Director, Central Office: Mike Donohoo

Vice-Director, Central Office: Ionel Onet

ELNA Archivist: Ionel Onet

Any member wishing to assist in the work of any of the above named commissions or committees should communicate with the member(s) shown.

### ELNA Dues for 1992

Regular	\$30
Family	\$45
Youth (under 27)	\$15
Limited income	\$15
Sustaining	\$60
Life	\$600

ELNA is a non-profit organization functioning under IRS paragraph 501(c)3. Donations are tax-deductible.

A separate supporting category, "Friend of Esperanto," has been established. A Friend of Esperanto pays \$10 per year.

Libraries and other institutions can subscribe to *Esperanto U.S.A.* at the special rate of \$15 per year.

### UEA dues 1992

Member-Guidebook only (MG)	\$ 8.00
Member-Yearbook only (MJ)	\$18.00
Member-Subscriber (MA)	\$45.00
Societo Zamenhof (additional)	\$90.00
Subscription only to Esperanto	\$27.00
Subscription only to Kontakto	\$14.00
Life Membership in UEA	\$1125.00

Send payments for UEA memberships or sub-

scriptions to ELNA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Make all checks payable to ELNA.

**MOVING? DON'T LEAVE ESPERANTO BEHIND!** If you have moved recently or are planning to move in the near future, don't forget to sent a change-of-address card to the ELNA Central Office, Box 1129, El Cerrito CA 94530. This will assure your continued receipt of the Newsletter and other information. If you don't have a stamp handy, give the CO a call at (510) 653-0998. Thanks!

**DEADLINE FOR MATERIAL FOR ISSUE  
1992(4) of Esperanto U.S.A. is May 25, 1992**

**Esperanto U.S.A.  
Volume 28, No. 2  
ISSN 1056-0297  
Esperanto League for North America, Inc.  
P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530  
Telephone: (510) 653-0998  
Editor: Don Harlow**